



Raportoj pri La Unua ILEI-seminario en Orienta Azio

Komunaj Organizantoj: Ĉina, Japana kaj Korea sekcioj de ILEI

Aŭspiciantoj : Tianjin Esperanto-Asocio, Tianjin-a Fremdlingva Universitato

Dato: 12a-15a de aŭgusto, 2011

Loko: Tianjin-a Fremdlingva Universitato, Tianjin, Ĉinio

Ĉeftemo: Kiel efike instrui Esperanton al azianoj?

EKSTRAKTO de GRATULOJ

De Stefan MacGill, Prezidanto de ILEI

Salutvortoj por la Unua ILEI-seminario en orienta azio



ILEI kun granda plezuro salutas la partoprenantojn de ĉi tiu plurnacia aranĝo, okazonta de la 12a ĝis la 15a de aŭgusto, 2011 en la Fremdlingva Universitato de Tianjin, Ĉinio, kun la trafa ĉeftemo: “Kiel efike instrui Esperanton al azianoj?”

Unu el la plej frapaj transformoj ĉe ILEI en la lastaj jaroj estas la impeta rekresko de du el niaj aziaj sekcioj. Tio formas kernan pravigilon pri niaj pretendoj je tutmondeco. En la naŭdekaj jaroj ni havis en Azio tri funkciantajn sekciojn; en Japanio, Ĉinio kaj la Korea Respubliko – sed en la komenco de la nuna jarcento la ĉina kaj korea sekcioj perdis siajn sekciestrojn – sekve tra pluraj jaroj tiuj sekcioj dormis. En la lastaj du-tri jaroj aperis

ambaŭlande novaj, aktivaj kaj kapablaj sekciestroj, kiuj sukcesis kunigi la sendube ekzistantajn instruistojn, organizi aranĝojn kaj starigi agadstrategiojn. Meze de tiu evoluo, okazis en junio 2010 la Azia Kongreso en Ulanbatoro – debateblas ĉiu ĝiaj sukcesoj sur la eduka kampo spronis tiun sekcian kreskon, kaj kiom el tio estis spegulaĵo de transformoj jam okazantaj (kaj nehaltigeblaj!).

Ĉiuokaze, la nuna Unua ILEI-seminario en orienta azio reprezentas plian etapon sur tiu kreska vojo, kies kulmino estos la sekvajara konferenco de ILEI en Kunming. La ulanbatora kongreso devas porti al ILEI la mesaĝon, ke “azia agado” ne plu signifas havi nur japanan, ĉinan kaj korean sekciojn. Nia ĵusa 44a konferenco en Kopenhago pruvis al ni, ke funkcias movadaj kaj instruistaj kernoj en Nepalo kaj Indonezio. Diskutoj kun la prezidanto de UEA dum UK evidentigis eblojn en Hinda Unio (Barato). Hazarda renkontiĝo tuj post UK en Malmo kun membroj de la vjetnama delegacio al UK metis bazon por arigo de instruistoj ankaŭ tiulande. Sendube, per kunlaboro kun la Azia Komisiono de UEA, eblos malfermi pordojn en pliaj aziaj landoj.

Plena je tiu vizio, mi salutas nome de ILEI la seminarion. La programo estu fake bonkvalita, organize trarompa, kaj etose pozitiva. Ĝi forigu la amikecon kaj kunlaboron inter kolegoj de la aziaj landoj. Ĝi estu la unua el multaj tiaj seminarioj, kaj ĝi liveru valorajn preparojn por nia sekvajara ILEI-konferenco – la unua okazigita en Ĉinio.

Stefan MacGill
Prezidanto de ILEI
2011.8.11

De Radojica Petrović, ILEI-estrarano pri edukprojektoj kaj konferencoj

Karaj organizantoj kaj partoprenantoj de la ILEI-Seminario en Orienta azio (ISOA) en Tianjin, Ĉinio, 11-15 agosto 2011.



En la ĵus finita 44-a konferenco de ILEI en Kopenhago, Danio, 17-23 julio 2011, mi havis la plezuron kaj ĝojon renkonti reprezentantojn de la sekcioj de ILEI en Ĉinio, Japanio kaj Korea Respubliko. Nun mi havas la plezuron saluti vin en la grava evento kiun tiuj tri ILEI-sekcioj kunorganizas. La instruagado en via mondoparto estas modela kaj ekzemplodona por la tuta ILEI kaj tuta E-movado. Mi ĝojas, ke ILEI en la jaro 2012 konferencos en via medio kaj ni havos ŝancon konatiĝi pli proksime kun viaj spertoj kaj lerni el ili.

Mi deziras al vi agrablajn tagojn kaj plezurajn laborojn en via nuna seminario, kaj ĝis revido en la 45-a Konferenco de ILEI en Kunming, Ĉinio, julio 2012.

.....

Mi gratulas vin kaj la Tianjin-an Esperanto-Asocion pro la bona organiza laboro. Al la kursanoj kaj instruistoj de la 2-a somera E-kursaro de ILEI-CN mi deziras bonan lernadon kaj agrablan restadon en Tianjin. Al partoprenantoj de la 1-a ILEI-seminario en Orienta Azio mi deziras plezurajn laborojn kaj rezultodonan traktadon de seminaria temo "Kiel efike instrui Esperanton al azianoj?".

Tiu temo aparte interesas min el la E-pedagogia vidpunkto. Mi kredas, ke ĝia traktado gvidos al evoluigo de pli efikaj metodoj de instruado de Esperanto ne nur al azianoj, sed ankaŭ al aliaj parolantoj de diversaj ne-hindeŭropaj lingvoj. La venontjara 45-a konferenco de ILEI en Kunming estos bona loko por prezenti kaj plutrakti rezultojn de tiu evoluo.

Kun aparta plezuro mi konstatas, ke la laborspacon por la nunaj kursaro kaj seminario donas Tianjin-a Fremdlingva Universitato, kiu tiel meritas nian dankon. Por ILEI estus grave se ili interesiĝus pri la 45-a konferenco kaj konferenca simpozio de ILEI, por kiu ni povu proponi konferencan temon interesan ankaŭ por la Fremdlingva Universitato de Tianjin kaj por pluraj ĉinaj universitatoj en kiuj Esperanto estas instruata.

Elkore,
Radojica Petrović,
ILEI-estrarano pri edukprojektoj kaj konferencoj

De Renato Corsetti, eksa prezidanto de UEA



Salutmesaĝo al la 1-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)

Estimataj organizantoj kaj partoprenantoj de la 1-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA) en Tianjin, Ĉinujo!

Nun fariĝis por mi relative rutina afero sendi salutmesaĝojn al eventoj pri Esperanto okazantaj en Ĉinujo. Pro tio estas malfacile ĉiufoje trovi novajn kaj taŭgajn vortojn, kiuj kongruu kun la entuziasmo de la organizantoj kaj de la partoprenantoj.

Sed la malfacilaĵo por mi estas tre malgranda dum tre granda estas la meritoj de ĉinaj esperantistoj, kiuj utiligas la novan socian situacion en la lando por vigle agadi. Oni ne povas nei, ke Ĉinujo estas nuntempe la plej vigle moviĝanta parto de Esperantujo. Pro tio la okuloj kaj esperoj de ĉiuj esperantistoj turniĝas al vi. Oni jam antaŭtempe atendas la jarcenton de Azio, kiu ŝanĝos la fortorilatojn en la mondo kaj eble skuos la dominadon de la angla lingvo.


Pro tio estu fieraj pro viaj atingoj sed sentu ankaŭ la respondecon pri la granda laboro, kiu kuŝas antaŭ vi. Ĉi tiu unua seminario de ILEI en Orienta Azio certe kontribuos al firmigo de la pozicio de ILEI en ĉi tiu parto de la mondo, kaj certe ĝi donos novajn perspektivojn pri la instruado de Esperanto en Azio. Ne estu timemaj, kritiki tion, kion oni produktis ĝis nun en la kampo de instruado de Esperanto kaj en la kampo de klarigado de Esperanto kaj de ĝia

gramatiko. Esperanto ne estas eŭropa lingvo, kiun oni akceptu tia, kia ĝi estas. Esperanto estas same multe azia lingvo, kiun vi analizu kaj komparu kun viaj lingvoj, el kiuj multaj riĉaĵoj povas veni al Esperanto.

Mi jam tro longe salutparolas, kiel okazas ĉe maljunuloj. Mi diru nur: Grandan sukceson al la 1-a ILEI-seminario en Azio! Grandan sukceson al Esperanto en Azio kaj en la mondo!

Renato Corsetti
Eksa prezidanto de Universala Esperanto-Asocio
2011.8.5

De Mirejo Grosjean, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono



Altestimataj,

Jam delonge mi aŭdis pri via tre grava komuna seminario. Mi gratulas kaj dankas la organizantojn. Mi gratulas ĉiujn, kiuj aliĝis kaj venis. Vi intencas pliboniĝi, plilertiĝi en la uzo kaj instruado de nia lingvo, gratulon pro tio!

Mi revidis aŭ ekkonis en Kopenhago plurajn gesamideanojn el Ĉinio, Koreio kaj Japanio kaj povis ricevi tre bonan impreson pri ilia lingvonivelo, ĝeneralaj kapabloj kaj grandega motivigo por subteni nian movadon en orienta Azio. Mi gratulas kaj dankas ilin. Konante unu la alian ni povos efike kunlabori kaj mi klopodos subteni vin laŭ miaj ebloj.

Kiel prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono mi zorgas pri Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE); nun staras en tiu grava listo naŭ personoj por Ĉinio, kvin por Koreio kaj kvar por Japanio.

Por la nun komencanta internacia seminario mi deziras al vi interesajn prelegojn, fruktodonajn interparoladojn kaj valoran interŝanĝon de spertoj. Per tio certe ĉiuj progresos!

Fartu bone!

Ĝuu esperanto-etoson!

elkore salutas Mirejo el Svislando

prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono
prezidanto de Svisa ILEI sekcio
komitatano A por Svislando ĉe UEA
kun-prezidanto de Svisa Esperanto Societo

Aŭgusto Casquero el Hispanio

Karaj ĉinaj, koreaj kaj japanaj samideanoj:

Je la nomo de ILEI-Hispanio, kaj de Valencia Esperanto Federacio mi deziras al via Seminario grandan sukceson. Certe vi fruktodone laboros kaj povos larĝe uzi nian karan internacian lingvon Esperanto.

Mi mem estis sekciestro de ILEI en Hispanio kaj mi konscias pri la graveco de ILEI en la instruado kaj disvastigado de nia lingvo.

Mi tre bedaŭras ne havi la eblecon partopreni. Nuntempe mi troviĝas en Hispanio post 4-monata instruado en Vietnamio, sed jam komence de septembro mi iros denove al Ĉinio. Mi esperas ie iam renkonti vin.

Ĝuu la Seminarion. Plej amike:

Aŭgusto Casqueo
Prezidanto de Valencia Esperanto-Federacio (Hispanio)

Prof. Ronald GLOSSOP el Usono

.....

Mi ĝojas ke mi povas sendi al vi salutmesaĝon, sed mi malĝojas ke mi ne povos esti kun vi kaj miaj multaj aliaj geamikoj en Ĉinio por via ILEI-seminario.

Bondezirojn el la Universala Kongreso en Kopenhago post la tre bonega ILEI-konferenco.

Profesoro Ron
Prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE)

S-rino TAN Xiuzhu, eks-prezidanto de ĈEL

.....

Leginte la duan bultenon de la seminario, mi estas forte impresita de la bona planado kaj riĉa enhavo de la kunveno kaj antaŭvidas ĝian abundan frukton.

Min aparte interesas ĝia ĉeftemo "Kiel efike instrui Esperanton al azianoj". Laŭ mia opinio, ĝi estas tre grava problemo en instruado de Esperanto al azianoj, kiuj lernas nian lingvon ne tiel facile kiel eŭropanoj. Trovi taŭgan vojon kaj bonan metodon por instrui Esperanton al ili ja estas esplorinda kaj studinda temo. Mi kredas, ke la seminario de Tianjin kun aktuala signifo certe sukcesos kaj ludos pozitivan rolon por disvastigi Esperanton kaj vigligi Esp-movadon en Ĉinio kaj aliaj partoj de Azio.

Transdonu miajn salutojn al ĉiuj partoprenantoj-amikoj ĉinaj kaj alilandaj.

Samideane via

Tan Xiuzhu , 2011-8-3

Profesorino GONG Xiao-feng, Ĉina sekciestro de ILEI



Estimataj gastoj,
Karaj samideanoj kaj geamikoj:

Bonvenon al Tianjin!

Estas bele stari ĉi tie kun vi. Laŭ la interkonsento en la kunsido dum la 6-a Azia kongreso de Esperanto en Mongolio. ILEI-anoj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio okazigos regulan renkontiĝon ĉiujare alterne. Estas honore, ke la 1-a seminario solene inaŭguriĝas en la ĉina urbo Tianjin. En la nomo de ILEI-Ĉinio, mi varme salutas vin kaj bonvenigas vin ĉiujn.

Nia ĉeftemo nomata "Kiel efike instrui Esperanton al azianoj" estas tre grava problemo en instruado de Esperanto al azianoj, kiuj lernas nian lingvon ne tiel facile kiel eŭropanoj. Mi atendas kaj antaŭvidas, ke ni trovos taŭgan vojon kaj bonan metodon por instrui Esperanton al ili.

Sanon kaj agrablan restadon en la urbo Tianjin.

Dankon!

GONG Xiao-feng, Sekciestrino de ILEI-CN
2011.8.13 Tianjin

S-ro LEE Jung-kee, Korea sekciestro de ILEI



Bonan matenon!

Antaŭ tri semajnoj mi estis en Kopenhago por du eventoj, nome la ILEI-konferenco kaj Universala Kongreso. En du renkontiĝoj, Usona profesoro Glossop parolis kun la temo: kial Ĉinio estas fekunda kampo por Esperanto? Li dufoje prelegis, en ILEI-konferenco kaj en Universala Kongreso. Hieraŭ vespere dum la interkona vespero mi rimarkis kial Prof. Glossop parolis tiel. Ĉar hieraŭ vespere ni renkontis multajn gejunulojn el diversaj provincoj. Vere ili donas al nia movado esperon en Ĉinio. Estas espero de Ĉinio kaj espero de nia tutmonda movado. Tiu ĉi renkontiĝo estas tre grava por ni ILEI-anoj, Ĉar tiu ĉi renkontiĝo estas unua, tre nova iniciato en Azio. Aliflanke, Tiu ĉi tiu renkontiĝo estas nova defio, kiel ni movadu en Azio sub la titolo ILEI.

Kiel vi scias, ĝis nun la ILEI-movado en Azio estis preskaŭ neniam kaj ĉiuj instruistoj, kiuj instruas Esperanton, dormis longe, Tamen nun estas tempo vekigi, de hodiaŭ tra tiu ĉi unua seminario. En la kopenhaga konferenco, nia kara amiko Trezoro estis elektita kiel sekretario de ILEI, kio simbole signifas, ke tiel ILEI bezonas gravigi vian rolon kaj la rolon de Ĉinio. Kaj post unu jaro, la 45-a ILEI-konferenco okazos en Kunming, kien venos ILEI-anoj el eŭropo, el Azio kaj kompreneble el aliaj kontinentoj. Do ni ĉiel sukcesigu tiun konferencon. Kompreneble, ni koreaj esperantistoj kaj japanaj esperantistoj kunlaboros, por ke ni montru kia estos nia azia konferenco en Kunming. Tio estas tre grava por tutmondigi nian movadon.

Do, mi aparte dankas al Prof. Arko kaj prezidanto Han Zuwu kaj LKK-anoj, kiuj tre bele perfekte aranĝis tiun ĉi unuan seminarion. Ankaŭ mi kore dankas al gravuloj, kiuj venis de fora loko, do, estimata s-ro Laulum, Li Weilun, Wang Minhao, Wei Shan kaj Trigo, kaj Estimata majstro Miaohui, do mi ne povas nomi ĉiujn; mi kore dankas vian varman bonvenigon.

Koran dankon.

S-rino ISIKAWA Tieko, Japana sekciestro de ILEI



Saluton, karaj ĉeestantoj de la 1-a ILEI-Seminario en Orienta Azio! Mi ege bedaŭras mian malĉeeston pro la forpaso de mia patrino en la 4a de aŭgusto kaj postaj aferoj. Fakte mi vere atendis tiun ĉi seminarion ekde kiam ni diskutis pri la eblo de komuna seminario inter ILEI-sekcioj en Ĉinio, Koreio kaj Japanio dum la lasta Azia Kongreso en Mongolio en la lasta junio. Sekvis interŝanĝoj de opinioj, kaj fine ni decidis okazigon de tiu ĉi seminario.

ILEI, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, estas organizo al kiu aliĝas ĉefe instruistoj kaj instruantoj de Esperanto, kaj ILEI-anoj nature havas grandan intereson pri instruado de Esperanto kaj en lernejoj kaj en lokaj, civitanaj grupoj, ktp. Laŭ la seminaria ĉeftemo “Kiel efike instrui Esperanton al azianoj?”, ni povas interŝanĝi niajn spertojn kaj opiniojn, kiuj certe donos al ni ĉiuj iajn, certe bonajn ideojn por nia laboro.

Mi esperas, ke ĉiu el vi povas preni fruktojn el tiu ĉi seminario kaj samtempe ĝui amikajn renkontiĝojn. Grandan sukceson al la 1-a ISOA en Tianjin!

ISIKAWA Tieko
Estro de japana sekcio de ILEI

Profesorino LUAN Hui-qin el la fremdlingva Universitato de Tianjin-



PAROLADO EN LA 1-A ILEI-SEMINARIO EN ORIENTA AZIO EN TIANJIN

Estimata prof. Gong Xiaofeng,
Estimata prof. Li Weilun,
Estimataj geamikoj el amikaj najbaraj Japanio kaj Koreio,
Karaj gastoj kaj amikoj,

Komisiite de la estro de la universitato prof. Xiu Gang kaj en lia nomo, mi bonvenigas vin ĉiujn al nia bela universitato por la 1-a ISOA en Tianjin. La estro Xiu preparas por la Internacia konferenco pri edukado de la japana lingvo kaj ne povas ĉeesti nian seminarion. Mi deziras plensukceson al la seminario, bonan sanon kaj ĝojan restadon en Tianjin al vi ĉiuj.

La Tianjin-a Fremd-Studa Universitato estas unu el la ok sendependaj fremdlingvaj superlernejoj en Ĉinio. La universitato havas 15 unuojn de instruadoj. En ĝi staras 28 specialecoj, inter ili estas 12 lingvaj specialecoj kaj 16 nelingvaj specialecoj. Estas fonditaj la amikaj rilatoj kun preskaŭ 70 universitatoj de 18 landoj, troviĝas pli ol 80 specialistoj kaj mil studentoj el eksterlandoj en la universitato. Kaj la universitato estas honorigita pro la sinsekva fondado de la “Konfucea instituto” en la famaj universitatoj de Koreio, Portugalio, Francio kaj Rusio.

Eble ekzistas iuj malfacilaĵoj en loĝado, manĝado kaj trafikado en la universitato pro tio, ke la universitato situas en la centro de la urbo, kvankam ni klopodas por fari pli bone. Mi petas vian pardonon kaj komprenon. Mi refoje dankas al vi pro via ĉeesto de Tianjin-a seminario kaj deziras al vi bonan tempon en Tianjin. Dankon!

Luan Huiqin

NAN You-li, prezidanto de Pekina E-asocio, salutas la seminarion, komisiite de ĈEL kaj la redakcio de EPC



Ĉina sekcio de ILEI kaj Tianjin-a Esperanta Asocio:

Okaze de inaŭguro de la 1-a ILEI-seminario en Orienta Azio, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de *El Popola Ĉinio* kore salutas vin ĉiujn.


La ĉina sekcio de ILEI fondiĝis antaŭnelonge, ĝi jam ludis gravan rolon en ĉina Esperanto-movado kaj eĉ en la internacia Esperantujo. La Esperanto-instruado rekte influas la entuziasmon kaj Esperanto-nivelon de lernantoj, la Esperanto-instruado estas plej baza ĉenero de Esperanto-movado.

En la pasinta mallonga periodo, la ĉina sekcio de ILEI vaste petis opiniojn de Esperanto-instruistoj de diversaj lokoj por kunfandi kreivajn ideojn de Esperanto-instruado en Ĉinio kaj konigi avantaĝan ideologion pri Esperanto-edukado al ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj; estas ĝojinde, ke oni jam akiris atingojn tiukampe.

Ni esperas, ke vi daŭre tenos tiujn ĉi entuziasmon, elbakos pli kaj pli multajn eminentulojn por la ĉina Esperanto-movado, ni esperas ankaŭ, ke tiu ĉi seminario brile sukcesos kaj kontribuos al nia Esperantujo.

Ĉina Esperanto-Ligo kaj redakcio de *El Popola Ĉinio*

Parolistino XU Yunying el Ĉina radio internacia



Estimataj kaj karaj:

Okaze de inaŭguro de la 1-a ILEI-seminario en Orienta Azio en Tianjin, Ĉinio, la E-redakcio de ĈRI esprimas al vi varman gratulon.

ILEI, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, estas organizo al kiu aliĝas ĉefe instruistoj kaj instruantoj de Esperanto, kaj ILEI-anoj nature havas grandan intereson pri instruado de Esperanto kaj en lernejoj kaj en lokaj, civitanaj grupoj, ktp.

La okazigo de la Unua ILEI-seminario en Orienta Azio en Tianjin intensigas la interŝanĝon kaj antaŭenpuŝas la Esperanto-movadon.

Ni deziras grandan kaj perfektan sukceson al la 1-a ILEI-seminario en Orienta Azio en Tianjin!

E-Redakcio de Ĉina Radio Internacia daŭre zorgos pri la progresoj.

Kun la sinceraj bondeziroj salutas via
Esperanto-Redakcio de ĈRI
Aŭguste, 2011, Pekino

Esperanto-kurso kaj ĝia instruo-metodo en Koreio

LEE Jungkee (Koreio)

Resumo: En Koreio tri universitatoj akceptas Esperanton oficiale kiel unu el la klerigaj lerno-objektoj. Kiel la kursoj funkcias kaj kiamaniere la studentoj utiligas Esperanton? Kaj Seula Esperanto-Kulturcentro okazigas Esperanto-kurson ĉiumonate. La kurso-gvidanto Ŝlosilo prezentas sian instrumetodon per gramatika diagramo.



1. Enkonduko

Estas du vojoj por lerni Esperanton en Koreio; en universitatoj kaj en Seula Esperanto-Kulturcentro ĉefe por seulanoj.

Krom tiuj kursoj, jare 4 foje okazas landskala kurso-kunveno (dufoje fare de Korea Esperanto-Asocio, dufoje fare de Namkang Esperanto-lernejo) kaj internacia kurskunveno alterne inter Koreio kaj Japanio aŭspiciate de Seula Esperanto-Kulturcentro el la korea flanko kaj Esperanto-Populariga Asocio el la japana.

Kaj Esperanta Asocio de Ŭonbulismo okazigas ĉiujare la aranĝon 'Internacia Esperanto-Meditado' internaciskale.

2. Kursoj en Koreio

2.1. En universitatoj

2.1.1. Univ. Dankook

De la jaro 1985 komenciĝis Esperanto-kurso kun du notoj en du kampusoj Jukjeon (najbare de Seulo) kaj Chonan. 4 klasoj estas aranĝataj po 70 kursanoj maksimume. La honora prez. de la univ. Dankook estas d-ro CHANG Chonngsik, kiu estas Honora Patrono de UEA.

2.1.2. Univ. Wonkwang

De la jaro 2003 la univ. akceptis oficiale Esperanton kiel unu el la klerigaj lerno-objektoj. 2 klasoj kun 2 notoj. La univ. estas eklezia univ. fondita de korea religio Ŭonbulismo. La 4-a Ĉefgvidanto de la religio Zuasan mem estas esperantisto kaj forta subtenanto por Esperanto.

2.1.3. Univ. Korea Fremdlingva

De la jaro 2005 la univ. komencis instrui Esperanton kiel unu el la klerigaj lerno-objektoj en du kampusoj (Seulo kaj Yongin) kun du notoj.

Estas aparte notinde, ke la plej prestiĝa univ. rilate al lingvo-studo sankciis la instruadon de Esperanto paralele kun aliaj naciaj lingvoj.

2.2. En Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK)

SEK estis fondita de LEE Jungkee (Esperanto-nomo Ŝlosilo) en la jaro 1991 por instrui Esperanton al civitanoj. La kurso okazis ĉiumonate tra 20 jaroj senpaŭze, tra kiuj 1600 civitanoj lernis Esperanton ĝis la aŭg. 2011. La aŭgusta klaso de la kuranta jaro estas 236-a kurso. SEK sidas en la centro de Seulo, en Myungdong.

SEK havas memorfeston en ĉiu kvara jaro, ekz., 'Memore al la 50-a kurso'.
En la 3-a de nov. en 2012, SEK havos memorfeston 'Memore al la 250-a kurso'.

3. Ŝlosila Metodo

La kurso ĉe SEK okazas 4 foje sabate dum 3 horoj, sume 12 horoj, tra tiom da horoj kursanoj ellernas bazan gramatikon de Esperanto.

Lernante Esperanton, ili renkontas eksterlandajn esperantistojn per Skajpo kaj Fejsbuko, kio donas intereson kaj freŝan impreson pri Esperanto. Ĝuste tio estas granda motivo-dono por la komencantoj. Post unu-monata kurso, ili daŭrigas sian mezan kurson ĉiuvendrede 4 foje monate.

Ŝlosilo instruas bazan gramatikon tra 4-fojaj kursoj monate per sia lerno-libro "Baza lernolibro de Esperanto". Jen estas konkretaj vicoj laŭ la gramatikaj elementoj.

En la unua tago: Prononco, Personalo, Ĉu-demandoj

(en la fino de la unua kurso, kursanoj provas paroli kun alilandanoj skajpe kaj spertas guston de Esperanto.)

En la dua tago: Verboj, Ki-demandoj, Infinitivo

(kursanoj komprenas ĉu kaj ki-demandojn. Kaj la rilato inter verbo kaj infinitivo)

En la tria tago: Numeralo, Tabelvortoj, Kondicionalo

(la rilato inter ki-demandoj kaj tabelvortoj, Ripetas verbo-finaĵojn lernante kondicionalon)

En la kvara tago: Komparativo, Participo, Rilativo

(lernante participon kursanoj ripete lernas rilatecon inter verbo kaj infinitivo)

Estas grave, ke la kursanoj ripete ekzercu Esperanto-gramatikon, kiun ili lernis antaŭ unu aŭ du semajnoj kaj ekzercante konversacion rete kun alilandaj esperantistoj iom post iom ili endroniĝas en Esperanto-maron.



Kun lerno-motivo kaj interesiĝo, ili jam ellernas la bazan gramatikon de Esperanto dum unu monato.

4. Konkludo

Daŭra provizo de motivoj al kursanoj kaj vekis intereson pri Esperanto estas gravaj en la elementa etapo. Kaj estas pli grave, ke la kurso-gvidantoj ne restigu siajn kursanojn longe en la komencanta etapo. Post baza kurso-periodo, la kursanoj tuj utiligu Esperanton laŭ siaj hobiaĵoj, interesoj, religioj kaj fakoj.

Citante la poemon de d-ro Zamenhof 'La vojo', mi finas mian prezentadon.

"... Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
pri l' tempoj estontoj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
ni semas kaj semas konstante..."

MIAJ PENSOJ PRI ESPERANTO-INSTRUADO

WANG Minhao (Ĉinio)

Enkonduko

Ekde la jaro 1984 mi ekinstruis Esperanton en diversaj e-kursoj okazigitaj de universitatoj, de la asocio, de entreprenoj. Nun mi daŭrigas mian instruadon. Kiel la fremdlingva instruisto, kiu diplomiĝis en la fremdlingva fakultato de la normala universitato mi ofte pripensas pri jenaj punktoj dum mia instruado. Mi deziras aŭskulti viajn opiniojn.



1. La celo de Esperanto-instruado

La lernado de Esperanto ĉefe estas la lernado de la lingvo mem. Ni devas multe prilabori esperantan aŭskultadon, paroladon, legadon, skribadon kaj tradukadon. Tamen Esperanto diferencas de naturaj lingvoj. D-ro Zamenhof kreis la lingvon kun sia sankta celo kaj ideo. Dum nia lernado de la lingvo ni ankaŭ devas lerni esperantisman ideon, kio estas kultura edukado. Tiam nia lernado de Esperanto povas esti daŭra kaj efika.

Kio estas esperantisma ideo? Ĝi estas esperantismo kaj la interna ideo de Esperanto, kiujn esprimis D-ro Zamenhof en sia versio.

La instruado de Esperanto inkluzivas tri partojn: kulturi bazajn kapablojn de la lingvo; konigi esperantan kulturon; starigi la internan ideon de Esperanto. Ĉiuj tri partoj kuniĝas kompakte.

Bazo de la esperanto-instruado estas kulturi al lernantoj necesajn kapablojn (aŭskultadon, paroladon, legadon, skribadon kaj tradukadon). Tio ne estas ĉio de la instruado. La celo de la esperanto-instruado estas komunikado inter diverslandaj esperantistoj tra la mondo, interŝanĝo de diversaj kulturoj, akirado de utilaj informoj kaj rezultatoj de homara civilizacio per Esperanto.

2. La ĉefaj taskoj de e-instruado dum lernado

Esperanto estas malofte ies gepatra lingvo, tial la esperanto-komunumo ricevas novajn adeptojn preskaŭ nur per instruado. De ĝi dependas la pluekzisto de la lingvo, tial la esperanto-komunumo nepre devas zorgi pri la instruado de sia lingvo.

La nivelo de la lingvoscioj de la kursanoj dependas ankaŭ de la kvalito de la instruantoj.

Do la instruistoj unue devas konigi al lernantoj la scion pri la lingvo mem; due devas instrui la scion pri kapablo posedi la lingvo.

Jen estas la ĉefaj taskoj dum e-instruado:

- 1). interesigu lernantojn pri Esperanto;
multeco de lernomaterialoj, sukcesosento de lernantoj dum lernado
- 2). havigu al lernantoj diversajn ŝancojn por lerni kaj komunikiĝi;
interparolado per Esperanto pri diversaj temoj
- 3). kulturu al lernantoj kapablon posedi Esperanton;
vortfarado per afikso, uzado de reguloj ktp.

- 4). helpu lernantojn venki malfacilaĵojn en lernado.
precipe venki malfacilaĵojn de la gepatrolingva influo

3. Influo de gepatra lingvo al lernado de Esperanto

Esperanta gramatiko ĉe la nasko celis eŭroplingvanojn, kaj tial estas foje malfacile komprenebla al ĉinoj. Kiel azianoj, ĉinoj havas komunan malfacilaĵon kun japanoj kaj koreoj, kiam oni lernas Esperanton. Nia gepatra lingvo forte diferencas kun Esperanto. Kompare kun eŭropaj lernantoj la kapablo de la gepatra lingvo foje malhelpas ĉinajn lernantojn en la lernado de Esperanto.

Por solvi la problemojn kaj venki barojn en lernado. Mi ofte atentigas la lernantojn pri diferenco inter la ĉina lingvo kaj Esperanto. En mia didaktiko troviĝas kelkaj ofte uzataj metodoj, ekz.

- 1). laŭ reguloj klarigi morfologion, vortordon, uzadon de akuzativo, vortfaradon ktp.; fari ekzercadon laŭ menciitaj ekzemploj;
- 2). aldoni diversajn e-legaĵojn de e-retejoj kaj gazetoj;
- 3). kuraĝigi lernantojn en interkomunikado kun alilandaj esperantistoj.

Uzante la suprajn metodojn mi kutimigas lernantojn al e-pensmaniero, venkante influon de la gepatra lingvo. Kelkaj problemoj en e-instruado de Ĉinio

- 1). Manko de altnivelaj instruistoj;
- 2). Manko de bonkvalitaj lernolibroj;
- 3). Manko de bonaj instruaj metodoj;
- 4). Manko de necesa subteno el koncernaj instancoj.

Malfacilaĵoj por japanoj en la lernado de Esperanto

ISIKAWA Tieko (Japanio)

Resumo: Kiel azianoj, japanoj havas komunan malfacilaĵon kun koreoj kaj ĉinoj kiam oni lernas Esperanton. Unu el tiuj malfacilaĵoj estas manko de vortoprovizo. Kaj krome, japanoj estas konataj kiel mallertaj parolantoj de fremdlingvoj ĝenerale. Ĉu troviĝas efikaj instrumanieroj? Mi volas paroli pri kelkaj rimedoj, kiuj taŭgas por la lernado de Esperanto.

Saluton, karaj aŭskultantoj! La temo de mia hodiaŭa prelego estas “Malfacilaĵoj por japanoj en la lernado de Esperanto”. Por la unua komuna seminario de ILEI-sekcioj en Ĉinio, Koreio kaj Japanio, ni elektis la ĉeftemon “Kiel efike instrui Esperanton al azianoj?”, ĉar tio fakte estas komuna intereso por Esperanto-instruantoj en aziaj landoj. Sed, ĉi tie la vorto “azianoj” signifas preskaŭ nenion; estas nur ĉinoj, koreoj, japanoj, ktp. kaj ni havas plejparte similajn, sed aparte malsamajn problemojn respective. Mi do parolos pri:

- 1) kia estas karakteriza sinteno de japanoj por la lernado de fremdaj lingvoj kaj Esperanto,
- 2) diversaj malfacilaĵoj/problemoj en la lernado de Esperanto, kaj
- 3) kiaj rimedoj/manieroj pli taŭgas por altigi komunikkapablon de lernantoj.

1) Kian karakterizan sintenon japanoj ĝenerale havas en la lernado de fremdaj lingvoj? Mi konas multajn ĉinojn kaj koreojn, kiuj bone parolas la japanan lingvon, sed nur malmultaj japanoj bone parolas en la ĉina aŭ en la korea lingvoj. Laŭ mi, granda problemo karakteriza por japanoj estas manko de memfido aŭ pozitiveco por elbuŝigi cellingvon. Se temas pri la angla, multaj japanoj, eĉ post kelkajara lernado en lernejoj, ne bone parolas ĝin. Eble instrumanoj ne estas bonaj, aŭ lernantoj ne estas diligentaj, sed kelkaj fakuloj diras, ke pro longjara tradicio de tradukado en preskaŭ ĉiu kampo en Japanio, japanoj tiom kutimiĝas pensi kaj kompreni ĉion en la japana. Unuflanke tiu tradicio malhelpas lernadon de fremdlingvoj ĝenerale. Alia elemento, kiu rilatas al la manko de memfido, estas erara ideo, ke ili devas paroli cellingvon kiel denaska parolanto de tiu lingvo, kaj ili klopodas malespere sekvi la modelojn. Feliĉe ne troviĝas denaksa parolanto de Esperanto en vera senco; troviĝas nur esperantistoj, kiuj ekde naskiĝo en sia hejmo parolas Esperanton kiel sia hejmlingvo. Nenie troviĝas lando aŭ regiono kie homoj parolas Esperanton kaj tiusence ni estas trankvilaj, ĉu ne?

2) Nu, imagu, ke lernantoj finas enkondukan parton kaj komprenas bazajn gramatikon kaj strukturon de Esperanto. Kio sekvas? Laŭ mi, la prononco de Esperanto ne tiom ĝenas japanojn ĉar la kvin vokaloj de Esperanto estas preskaŭ samaj al tiuj de la japana, sed kelkaj emas prononci sinsekvajn konsonantojn kun nenecesaj vokaloj, ekzemple “trompi” kiel “torompi” kaj “kruda” kiel “kuruda”, aŭ male, sen necesaj vokaloj, ekzemple “sukero” kiel “skero”. Tamen multokaze, laŭ la kunteksto, ni povas kompreni kion tiu volas diri. Tiusence mi diru, ke prononco de Esperanto ne estas granda problemo por japanoj.

Unu el la veraj problemoj/malfacilaĵoj por ni estas, kiel jam menciis NEMA, manko de vortoprovizoj. Estas nature, ke tio dependas de scio de aliaj, precipe eŭropaj lingvoj. Ĉu ekzistas efika instrumetodo por multigi vortojn? “Oficiala Radikaro Esperanta” kaj relative novaj vortaretoj bazitaj de ORE kiel “Baza Esperanta Radikaro” kaj “Ilustrita Oficiala Radikaro Esperanta por Lernanto” eble estas necesaj por komencantoj. Legado de libroj skribitaj en facilaj, kutimaj vortoj ankaŭ helpas lernantojn multigi kaj memori vortojn. Mi poste parolos iom detale pri tiu temo.

Aŭskultado ankaŭ estas grava sed malfacila por komencantoj. Lastatempe troviĝas interrete multaj retejoj aŭ retpaĝaroj kaj ni povas aŭdi Esperanton, sed por komencantoj multaj el ili ŝajnas malfacilaj, ĉar homoj parolas rapide kaj plejparte sen tekstoj, kiujn aŭskultantoj povas vidi. Aperis, tamen, lastatempe tre bona retejo “facila vento”. Ĉu vi jam vizitis la retejon? La celo de tiu retejo, laŭ iniciatintoj, estas doni al komencantoj bonajn aŭdmaterialojn kun la tekstoj surekranaj. Mi trovas la retejon nepre vizitinda kaj taŭga, do vizitu se vi ankoraŭ ne vizitis la retejon.

Ni ofte renkontas la esprimon “muro antaŭ komencantoj”. Por transsalti ĝin, kion ni bezonas? Frazfarado estas bona ekzerco por altigi lingvokapablon ĉar en Esperanto ne ekzistas granda diferenco inter paroloj kaj skribaĵoj. Se oni bone skribas, tiu ĝenerale bone parolas, ĉu ne?

3) Kiajn rimedojn/manierojn mi aplikas en miaj klasoj por altigi komunikkapablon de miaj lernantoj? Mi jam menciis gravecon de legado de facilaj rakontoj aŭ noveloj. La legmaterialo nun tre ŝatata en miaj klasoj estas la serio de Katrina, verkita de Sten Johansson en bazaj facilaj vortoj. Dum la legado de tiuj libroj, oni ripete renkontas multajn kutimajn vortojn kaj esprimojn, kaj ili iom post iom fiksiĝas en nia memoro. Multaj lernantoj ŝatas la rakontojn, ĉar ili traktas

modernajn vivojn de homoj, ne tiom fremdaj por lernantoj. La rolo de instruanto estas montri taŭgajn, bonajn librojn al la lernantoj.

Pri frazfarado. Mi ofte donas taskojn fari kelkajn frazojn diverstemajn; temoj estas ne fakaj sed kutimaj, ĝeneralaj kiujn ni renkontas en nia ĉiutaga vivo. Mi unue donas al la lernantoj kelkajn frazojn en la japana, kaj ili skribas ilin en Esperanto. Mi korektas iliajn erarojn gramatikajn kaj montras modelajn, eble pli bonajn esprimojn, por ke aliaj homoj bone komprenu. La granda tertremo en orienta Japanio en marto kaj sekvanta terura akcidento en atomcentralo en Fukuŝima ankaŭ estis temoj de frazfarada ekzerco. Por ke aliaj homoj facile komprenu, mi ofte montras kelkajn formulajn esprimojn al miaj lernantoj, ekzemple esprimojn kiel “Mi opinias, ke ---“, “Mi pensas, ke ---“, “Mia opinio estas, ke---“, “Al mi ŝajnas, ke ---“, “Miaopinio”, “Mi dirus, ke ---“ aŭ “Laŭ mi”.

Gramatikaĵoj kiel participoj kaj kelkaj uzmanieroj de akuzativo kaj ‘si’ ankaŭ estas malfacilaj elementoj dum la lernado. Por bone kaj efike instrui tiujn lernopunktojn, ni instruantoj devas montri laŭeble multajn ekzemplojn familiarajn.


Nun vi eble rimarkis, ke la supremenciitaj malfacilaĵoj, tamen, estas komunaj por ni azianoj; kompreneble kelkajn el la malfacilaĵoj ankaŭ havas lernantoj en aliaj regionoj.

Kial homoj lernas Esperanton? Ĉar ili volas komunikiĝi kun alilandanoj, ĉu ne? Do, grave estas, ke lernantoj ĝoje lernu la lingvon kaj havu ŝancojn renkontiĝi kaj uzi Esperanton. Nia tasko certe estas kuraĝigi ilin kaj doni okazojn praktiki Esperanto-konversacion. Ni kune laboru por efike instrui Esperanton kaj baki bonajn, kapablajn esperantistojn!

Muron de vortoj! Kiel transsaltu Aziaj lernantoj?

PARK Yongsung(Nema) (Koreio)

Resumo: Esperanto havas bonan gramatikan strukturon por ĉiuj landanoj ellerni. Kaj eŭropanoj ne sentas muron pri la vortoj Esperantaj. Tamen, Aziaj lernantoj tuj frontas la malfacile altan muron de vortoj post la nova bakiĝo. Por faciligi kaj efikigi la nepre necesan paŝon pri vortokapablo, Doni al lernantoj vortlistojn, kiuj aranĝis laŭnivele en kvantoj fiksitaj. La baza radikaro oficiala (BRO) de la Akademio de Esperanto jam gajneblas. Utiligi ĝin efike donos al ni eblecon egaliĝi kun eŭropanoj pri vortokapablo en Esperantujo.



Enhavo

Situacio laŭ la paŝoj

- Gramatikon komprenas. (Facileco) – Kelkajn monatojn
- Bazaj vortoj, Simplaj frazoj. (Ofteco) – Pli-malpli unu jaron
- Facilaj legolibroj, Kunvenoj maloftaj
- Ne plu ...

Kialo de la stagnado

- Azianoj alfrontas la Muron de vorto!
- Malfacilas ĝui librojn, gazetojn.
- Malkuraĝas eniĝi en la internacian movadon.

Kiel Azianoj efike transsaltu la muron de vorto ?

- 1) Enkadre
- 2) Laŭnivele

Reala metodo

- 1) Enkadre → Akademia Vortaro
- 2) Laŭnivele → Baza Radikaro Oficiala (Vortlisto laŭnivela)

Vortoj havas flugilojn.

- Nova vorto havas fortajn flugilojn.
- Ĝi ne emas loĝi en nia cerbo.
- Hodiaŭ renkontiĝas, Morgaŭ ennebuliĝas.
- Malfacilas pro neofta renkonto.
- Por Azianoj, Novaj vortoj forflugadas.
- Latinida-lingvanoj ne suferas.
- Eŭropanoj, Usonanoj ne suferas tre.
- Multe da klopodoj por Azianoj.

KIEL ALTIGI LA ESPERANTO-NIVELON DE ĈINOJ?

HAN Zuwu (Ĉinio)

Jam pasis pli ol 90 jaroj, de kiam Esperanto eniris en Ĉinion. Sub la klopodo de tri generacioj, Esperanto disvolviĝas zigzage kaj la lingva nivelo de ĉinoj ĝenerale altiĝas iom post iom. En flankoj de studado de esperantologio, tradukado de ĉinaj kaj alilandaj verkoj, la internaciaj interŝanĝoj, instruado, popularigado kaj altigado de Esperanto aperis kaj aperas multaj elstaraj talentuloj, kiel la avangarduloj de la ĉina esperantistaro, gvidas multajn esperantistojn aktiviĝi en en-kaj eksterlandaj diversaj kongresoj, seminarioj, renkontiĝoj kaj aliaj eventoj. Ili montras la altan nivelon de Esperanto.



Sed nia nivelo estas relative postiga kompare kun tiu de multaj landoj en la eŭropa, amerika kaj aliaj regionoj. Pro tio, unue ni devas trovi la problemojn, poste ni solvos ilin kaj kuraĝos atingi la progresintan nivelon en la mondo, por ke ĉinaj esperantistoj plene ludu la rolon de Esperanto kaj servu al la reformado kaj malfermado de Ĉinio.

La ĉefaj problemoj:

1. La malegaleco de la Esperanto instruado en diversaj regionoj. Ekz.en iuj regionoj ne estas kvalifikaj instruistoj, ne ekzistas eĉ unu Esperanto-kurso, nur estas propagando. Estas malfacile imagebla, ke oni ne kredas vian paroladon, se vi ne parolas eĉ unu vorton en Esperanto.
2. La malegaleco de la malsamaj niveloj en la Esperanto-instruado en diversaj regionoj. Tio kaŭzas la malegalecon de iliaj lingvaj niveloj. Ekz. en iuj regionoj aspektas la arda fenomeno, eklernis Esperanton centoj da lernantoj, sed la aktuala situacio estas, ke la plej parto de lernantoj ne komprenas eĉ simplajn frazojn. Ilia skriba traduko ne estas komprenita por legantoj. La kialo devenas de la malalta nivelo de la instruistoj.
3. La disigo de instruado kun vera rezulto. Iuj instruas por strebi nur al la nombro de lernantoj, nur al la influo en la publika opinio, sed ne por vere scipovi la lingvon.
4. La disigo de instruado kun aplikado. Iuj lernas nur por pasigi ekzamenojn kaj gajni la lernopontojn, ne por apliki Esperanton en diversaj fakoj.
5. La manko de la trejnado kaj konfirmado al Esperanto-instruistoj, kiuj eĉ prononcas ne ĝuste.
6. La manko de la studado kaj esplorado al la instruaj metodoj.
7. La manko de la ekzamenaj normoj kaj manieroj al la instrua nivelo.
8. La manko de la kunaranĝo kaj harmonio al la instruado en la tuta lando.

La ŝlosiloj de la problemoj:

Unu el ili estas sistema esplorado de diversloka instrua nuna situacio. La alia estas la ĝenerala altigo de la instrua klereco, lingva nivelo kaj instrumentoj de la instruistoj. La Esperanta kaj aplikado de la lingvo estas du ĉefaj taskoj por la esperantaj instruistoj. La du taskoj estas la ŝlosiloj por solvi la problemojn.

1. Fondi la tutlandan organizon de la Esperanto-instruistoj -- ĉinan sekcion de ILEI, por ke ni kunaranĝu kaj akordigu la trejnadon kaj konfirmon de la Esperanto-instruistoj; kunaranĝu kaj akordigu la seminariadon de la Esperanto-instruado; decidu la ekzamenajn normojn kaj metodojn; ĉeestu kaj okazigu la Esperanto-seminariadon kaj internaciajn ekzamenojn de ILEI; kompilu kaj faru la Esperanto-lernolibrojn kaj vid-aŭdajn materialojn ktp.
2. Kuraĝigi la divers-regionajn Esperanto-organizaĵojn funkcii diversajn Esperanto-agadojn, maksimume uzante Esperanton por fondi la atmosferon de Esperantujo. Tie esperantistoj libere interparolas, ĝoje kantas, gaje dancas kaj arde amuziĝas por ekzerci sin en la aŭskultado kaj parolado de Esperanto.
3. La deverslokaj Esperanto-organizaĵoj klopodas sendi siajn membrojn ĉeesti en-kaj ekster-landajn Esperanto-aktivadojn por ĵeti ilin en la Esperanto-atmosferon fari interfluadon kaj praktikadon.
4. La aplikado de Esperanto en diversaj flankoj povas akceli la lernadon, praktikadon kaj uzadon, cele de servado de Esperanto al la politiko "Reformado kaj malfermado" de Ĉinio, servado al la mondpaco, amikeco, disvolviĝo kaj harmonio tra la mondo.

La peza tasko, kiel sia neevitebla morala devo, devas esti metita sur la ŝultro de Ĉina Esperanto-Ligo. Mi esperas, ke la ĉinaj esperantistoj unuiĝu, diligente laboru kaj klopodu por altigi nian Esperanto-nivelon.

Ĉu azianoj povas paroli Esperante ene de monato?

GONG Xiao-feng (Arko) (Ĉinio)

Resumo: Multaj ĉinaj esperantistoj, kiuj jam lernis nian lingvon kelkdek jarojn, tamen ankoraŭ ne povas flue paroli. Kiel lerni kaj uzi nian lingvon? Ĉu Azianoj povas paroli Esperante flue ene de monato? La 2-a Vintra E-kursaro okazigita en Kantono ĉi-jare konfirmis la eblecon. Fotoj, sonaĵoj estos prezentataj.



Enhavo

- Ĉu ekzistas taŭga metodo instrui Esperanton al ĉinoj
- Kiel paroligi lernantojn en BEK-kurso
- Ekzemplo: La 2-a vintra E-kursaro (VEK) de ILEI-CN

1. Ĉu ekzistas taŭga metodo instrui Esperanton al ĉinoj

Mi mem ne estas instruistino pri lingvo. Do, mi parolas nur pri mia sperto en E-instruado. Esperanto estas nedevigita leciono ĉe mia universitato de la jaro 2004. Dum lastaj jaroj, mi gvidis kvar kursojn kaj entute 400 gestudentoj vizitis la kursojn.

Kutime oni instruas Esperanton de 3 flankoj, nome: elparolo (prononco), gramatiko, vortoprovizo. Miaopinie, prononco kaj gramatiko ne estas malfacile lerneblaj por gestudentoj, la plej malfacila estas vortoj. Por azianoj ni devas lerni eĉ etan vorton. Multe da lernantoj ne ĝuste

uzas la vortojn kaj la skribado estas malfacile komprenita de eŭropanoj.

Ĉinaj lingvaj instruistoj instruas fremdlingvon al lernantoj laŭ la vico: vortoj, gramtiko, frazoj, teksto/dialogo, ekzerco, ktp.. La instruisto klarigas kutime ĉine kaj lernantoj jam kutimiĝas pri tiu metodo. Post la lernado, lernantoj eble kapablas legi, traduki, sed ne povas libere babili kaj kompreni unu la alian. De komenco de la lernado, mankas al lernantoj pensmaniero per Esperanto. Mi uzis tiun tradician metodon en la unua kurso, 32 lerno-horoj estis por la kurso.

Por efike instrui Esperanton, mi komencis uzi metodojn "perbilda metodo" kaj "rekta metodo" en mia dua kurso. La bildoj fortigis memoron pri la vortoj kaj frazoj. Lernantoj tre interesiĝis pri la metodoj kaj progresis rapide. Dum la instruado, mi ĉefe instruis al ili kiel komenci korespondon kaj babiladon kun alilandanoj. Sed, bedaŭrinde, lernantoj ankoraŭ balbutis renkontinte alilandanon. Studentoj diris, ke ŝajne, ĉio malaperis de ilia kapo tiam.

Ĉu ekzistas taŭga metodo instrui Esperanton al ĉinoj?

2. Kiel paroligi lernantojn en BEK- kurso

BEK-lernolibroj estas verkitaj de S-ro Dennis KEEFE. En la libroj ne troviĝas vortlistoj, nek klarigo de gramtiko, nur tipaj frazoj kaj demandaro. Studentoj ne mem faras frazojn, ili nur imitas, enkapigas kaj respondas la demandaron. La plej grave estas ke dekomence la lernolibroj starigas pens-manieron en Esperanto por studentoj.

Mi lernis tiun metodon de Dennis KEEFE komence de la jaro 2010, kadre de la 1-a vintra E-kursaro en Hainan-insulo. Kelkaj aliĝis al la kurso, sed finfine Dennis nur elbakis unu studentinon nomatan HUANG Xiao-juan, filino de S-ro Trezoro. Post 4 semajnoj ŝi mirinde parolis nian lingvon tre flue. Tiam mi ankoraŭ ne kredas, ĉu tiu metodo estas bona aŭ ne, mi pensas, ke eble HUANG Xiao-juan estas eksterordinara, ĉar ŝia fako ĝuste estas pri la angla lingvo.

Januare de 2011, okazis la 2-a vintra E-kursaro en Kantono, mi kun 8 gestudentoj el nia universitato restis tra la tuta monato tie. La kurso daŭris 6 horojn ĉiutage. 24 kursanoj aliĝis por la baza kurso (la unua duonmonato), 12 por la meza ka progresita kurso (la dua duonmonato). Kaj 12 el ili estas novuloj, kiuj neniam lernis nian lingvon antaŭe, inkluzive Vjetnamia studentino.

Dennis estas talenta instruisto, unue li montris, due, studentoj montris kaj poste kvarope studentoj praktikis. Dum la praktikado flueco, ĝusteco kaj rapideco estas la plej gravaj postuloj. Je la unua praktik-vico kvar studentoj rajtas rigardi la lernolibrojn, duavice, nur demandanto rajtas rigardi la libron kaj aliaj tri respondantoj ne rajtas rigardi. Tamen ili rajtas peti ripeton de la demando, se li/ŝi ne komprenis aŭ ne kaptis la demandon. En la kurso de Dennis, lernantoj multe praktikis kaj enkapigis multaj demandojn kaj respondojn. Iom post iom ili ofte pretervole elbuŝigis esperantajn frazojn nature kaj flue.

Post 120 horoj da lernado (BEK-kurso estas tre intensiva kurso), studentoj kapablas diskuti pri multaj temoj senprezare, eĉ posedas multe da konoj pri E-movado, literaturo k.a.

Ĉu BEK-kurso bone funkcias por ĉinaj lernantoj? Por ke provu BEK-metodon, aprile mi varbis 20 gestudentojn por instrui al ili Esperanton. Mi trovis, ke tiu ĉi kurso estas la plej efika kurso el miaj E-kursoj. Post 6 horoj, studentoj kapablas paroli laŭ la bildoj 76 frazojn senrompote. Mi povus tiel diri, ke BEK-metodo estas bona por lerni nian lingvon.

Sed, ĝi taŭgas por junaj gestudentoj, kiuj jam lernis iun eŭropan lingvon, por mezaĝulo, ne. Krome, ĝi ne taŭgas por komencantoj memlerni, ĉar mankas klarigoj nacilingvaj en la lernolibroj. Dum la BEK-kurso ni ankaŭ renkontis similan problemon. Dennis instruas per Esperanto, komence de la kurso gestudentoj ne povas kompreni kion li diris kaj progresis malrapide. Dennis petis min iomete traduki. Mi kiel organizanto kaj helpanto spertis la 1-an kaj la 2-an vintrajn E-kursarojn en Hainan-insulo kaj en Kantono. Mi opinias, ke klarigoj en nacia lingvo estas bezonataj por komencantoj, speciale en la unua semajno. Tio helpas la instruadon.

3. Ekzemplo--La 2-a vintra E-kursaro (VEK) de ILEI-CN

Fotoj kaj filmetoj estas prezentitaj

.....



PRI ESPERANTO-INSTRUADO EN

SUPERAJ LERNEJOJ

LI Wei-lun (Ĉinio)

Ĉe la unua tago de la naskiĝo de Esperanto jam komenciĝis ĝia instruado. La Unua Libro de Zamenhof fakte estis lernolibro. Tiuj, kiuj ricevis ĝin, tuj komencis la lernadon. La lernantoj pli kaj pli multiĝis, kaj formiĝis la Esperanto-movado. Esperanto-instruado ludas gravan rolon en nia movado. Ni povas diri, ke ne estus Esperanto-movado sen Esperanto-instruado. Superaj lernejoj estas gravaj lokoj por instrui Esperanton. Jen la kialoj:

1. Studentoj estas junaj. Junuloj interesiĝas pri novaj aferoj. Ili volas akcepti Esperanton.
2. Studentoj aĝas pli-malpli 20 jarojn. Ili havas bonan memoron kaj rapidan kaptecon.
3. Studentoj havas altan kulturen nivelon. Ili posedas almenaŭ unu fremdlingvon. Por ili Esperanto estas facile lernebla.
4. En multaj superaj lernejoj oni aplikas sistemon de lernopojtoj. Esperanto estas facila. Studentoj volas lerni Esperanton por havigi lernopojtojn.
5. En superaj lernejoj la instrua ordo estas stabila. Studentoj povas regule ĉeesti lecionojn.
6. Studentoj iras al diversaj lokoj post siaj diplomitiĝoj. Ili povas disvastigi Esperanton.

Por allogi studentojn al la lernado de Esperanto ni devas fari prelegon pri nia lingvo kaj nia movado. Ekzemple, kio estas Esperanto? Ĉu Esperanto estas facila kaj utila? Ĉu la Esperanto-movado sukcese marŝas?

Kiun metodon ni devas uzi en Esperanto-instruado? Laŭ miaj spertoj, ni devas uzi sintezan aŭ miksan metodon. Ekzistas multaj metodoj por instrui fremdajn lingvojn. Ĉiu metodo havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn, kaj tiamaniere formi novan metodon, t. e. Sintezan aŭ miksan metodon. Ĝi ne estas fiksa nek unika formo. En diversaj landoj kaj malsamaj instruperiodoj, laŭ diferencaj lernantoj kaj malsimilaj lernoceloj, ĝi povas varii.

La principoj de la sinteza metodo estas jenaj:

1. Laŭeble uzi Esperanton por instrui Esperanton, sed ne ekskluzivi gepatran lingvon.
2. Lerni necesajn gramatikajn regulojn, sed ne troigi ilin.
3. Fari ekzercojn aŭdan, parolan, legan, skriban kaj tradukan, emfazi kelkajn laŭnecese.
4. La instrumaterialoj devas esti valoraj por interkomunikiĝo.
5. Plene disvolvi la aktivecon de lernantoj, sed ne malatenti la gvidan rolon de instruistoj.

Nuntempe la grava problemo estas manko de instruistoj, ĉar el ili iuj emeritiĝis, iuj forpasis, iuj transloĝiĝis al aliaj landoj. La urĝa tasko estas trejni instruistojn. Kiu faros tion? La Ŝtata Eduka Komisiono? Ne eble, La Ĉina Societo de Esperanto-instruado en Superaj Lernejoj? Malfacile, sed eble. Ekzemple, la societo povus komisi tiun taskon al iu supera lernejo aŭ iu Esperanto-asocio. Pri tio ni povus diskuti detale.

Esperanto-kurso de Ikedakita-Supermezlernejo



Huĝimuoto Ricko (Japanio)

1. Antaŭparolo

En Japanio, la ministerio pri edukado, kulturo kaj scienco, decidis lern-objekton en oficialaj lernejoj. Esperanto ne ekzistas inter ili. Ekde la jaro 2000, unuopaj lernejoj povas aldoni iom da propraj lern-objektoj.

Ikedakita-Supermezlernejo estas tute ordinara lernejo, kiun fondis la gubernio Osaka (8.84 milionoj). En aprilo ĝenerale eniras 240 gelernantoj en lernejon, kies plejmulto aĝas 15, kaj ili lernas 3 jarojn. Kaj la 3a gradanoj povas elekti la kurson "Internacia Kompreno", kiu inkluzivas Esperanto-kurson.

2. Kion celas nia kurso "Internacia Kompreno" (Kompreni alilandajn homojn kaj kulturojn)

Nia lernejo kreis ĉi tiun kurson, por ke lernantoj povu havi pli vastan vidpunkton kaj riĉigan vivon post kompreno de alilandaj homoj kaj kulturoj. Instruistoj unue pensis ke rigardi najbarajn landojn estas grave. En la gubernio Osaka loĝas ĉirkaŭ 130 mil koreoj (133,336 personoj/2009) kaj ĉirkaŭ 48 mil ĉinoj (48,155/2009). Tial la korea lingvo kaj la ĉina lingvo estis elektitaj. Sekve ili aldonis Esperanton, kiu povas kovri ceterajn tutlandojn.

En la lernej-jaro 2005 aprile, oficiale komenciĝis la kurso "Internacia Kompreno", kiel unu el elektablej kursoj por la 3a gradanoj, kies aĝo estas 17 aŭ 18. Tiun elektis 16 lernantoj. Por tiu kurso 4 gvidantoj kunlaboris. Lernantoj povis elekti 2 lingvojn el 3, nome la ĉina lingvo, la korea lingvo kaj Esperanto. Dum unu jaro kursanoj ricevis 3-horan lernadon kaj akiris 3 studpontojn post tutjara lernado kaj sukceso de ekzamenoj regule okazigitaj en nia lernejo.

Unu jaron antaŭe okazis prov-instruado, kaj 21 elektis nove naskitan kurson. Ili lernis la

korean lingvon kaj Esperanton, respektive duonjaron. En semptembro, 2004, kiam unuafoje okazis Esp-kurso, mi estis dungita kiel Esp-gvidanto.

3. Konkrete ĉi tiel...

En la antaŭa duonjaro okazas ĉirkaŭ 35 hora kurso de du lingvoj paralele. En Japanio komenciĝas lernejo en aprilo kaj finiĝas en marto. Denaska lingvano de la ĉina lingvo gvidas sian lingvon kaj mi instruas Esperanton. Same kiel tiu, en la lasta duonjaro okazas ĉirkaŭ 35-hora kurso. Denaska lingvano de la korea lingvo gvidas sian lingvon kaj mi instruas Esperanton. Ankaŭ regulaj ekzamenoj okazas post lernado.

En nia kurso sub titolo de "Internacia Kompreno" ne mankas kunlernaj lecionoj. Ĉiuj kursanoj spertas kuiradon de ĉina hejm-menuo (Ĵiaoziroj) kaj korea hejm-menuo (ĉizimi, korea pico). Iujare kursanoj kelkhoraj lernis ludi tradiciajn muzik-instrumentojn de Koreio kaj prezentis ludadon septembre en la tago de la lerneja kultur-festo. Programo varias laŭjare.

Por enkonduko, ni ĝenerale uzas kelkajn paĝojn de libreto "Invito al Internacia Lingvo Esperanto", kiun eldonis JEI (Japana Esperanto Instituto). Poste en sekvaj lecionoj ni penas prezenti vivajn scenojn de la lingvo.

Pere de neŭtrala kaj facile lernebla lingvo Esperanto, ni klopodas havigi al la lernantoj internacian guston kaj vastan perspektivon trans landlimoj.

Ni kombinas jenajn ok manierojn laŭ kapablo de nia lernantoj.

1. Kanto ĉe la komenco, "Kanto de ABC"
2. Ludoj kun rekvizitoj / (Paneletoj de kolorigitaj desegnoj)
 - * Ni trejnigis kalkuladon uzante memfaritajn rekvizitojn (lernilo), kiam ili lernis nombrojn. Mi skribis ciferojn sur rondaj ventumiloj. Kaj montrante tiujn ilojn, ili reciproke ĝuis facilan kalkuladon: plus, minus, oblo kaj divido.
 - * En la lasta leciono por progresigi parol-kapablon, ili ĝuis vojaĝ-ludon: nome ĵetante etan kubon, sur kies 6 surfacoj ciferoj 1-6 estas skribitaj. Ĉe halt-loko oni devas demandi al aliaj kolegoj leginte jam skribitan frazon. Aliaj devas respondi.
3. Interreta kurso
 - * Per komputiloj en la lernejo ni kelkfoje spertis interretan kurson ("Kurso de Esperanto").
4. Intervjuo al gastoj el alilandoj
5. Interŝanĝo de kartoj
6. Interreta korespondo
7. Video-lernilo "Mazi en Gondolando"
8. Simpla teksto kaj vortaro kun desegnaĵoj

4. Nombro de lernantoj

En la lastaj 7 jaroj preskaŭ 100 lernantoj ricevis duonjaran Esp-kurson kaj ili travivis ke nia lingvo Esperanto efike funkcias kiel komuna lingvo inter diversaj popoloj.

.....

5. Ĝisnunaj gastoj al nia lernejo el diverslandoj

Dank' al alilandaj gastoj, kiuj afable vizitis nian lernejon, ni povis havi intervjuan kurson. Tiu sperto impresis la lernantojn neforgeseble. Ĉiu el lernantoj povis rekte intervjui al la gasto laŭ demando preparita per si mem. Intervjua kurso plej ofte okazis post dek-kelkhora lernado.

6. Ĝisnunaj interŝanĝoj de retmesaĝoj kaj poŝtkartoj

Ĉiuj lernantoj havas sian ret-adreson en nia lernejo. Uzante komputilojn de nia lernejo ni povas komuniki rete kun esperantistoj (Bedaŭrinde oni de povas utiligi skajpon en nia lernejo.)

Jarfine niaj lernantoj rete sendis kristonaskajn kartojn uzante hejmpaĝon de Rovaniemi, Finnlando. Ankaŭ poŝte ni plurfoje interŝanĝis novjarajn kartojn kun lernantoj en Tajvano.

Tiuj, kiuj favore kaj fervore subtenis nian kurson, estis plej ofte instruistoj aŭ gvidantoj de Esperanto. Precipe en la jaro 2007 S-ro Fabien Thcsudĝ en Francio ret-korespondis kun ĉiuj lernantoj. En la jaro 2009, 2010 kursanoj de la lasta duonjaro ret-korespondis kun kanadaj gejunuloj, kiujn gvidis s-ro Jean Codjo. En 2011 kursanoj de la antaŭa duonjaro ret-korespondis kun hungaraj lernantoj, kiujn gvidis s-ino Baloghne Fodor Eva.

.....

INSTRUADO DE ESPERANTO EN URBO CHANGZHOU

Zhang Changsheng (Ĉinio)

Prezidanto de la Changzhou-a E-Asocio

Je la 1984a jaro Esperanta fajrero (*Fajrero* estis inter la unuaj E-gazetoj en urbo Changzhou) troviĝis en urbo Changzhou, Jiangsu Provinco, sudoriente de Ĉinio, kiu situas ĉirkaŭ la centro inter famaj urboj Shanghai kaj Nanjing. Post malfermado kaj reformado de Ĉinio, ĉina junularo sopiris malfermi la fenestron al la mondo kaj esplori la eksterajn aferojn. Ili diligente kaj arde lernis fremdajn lingvojn kiuj estas iloj de interkomunikado.



Esperanto kiel facila kaj lernebla lingvo estas ŝatata por junularo. Tiam en Changzhou-a Pedagogia Kolegio elstaris kelkaj E-kursoj. La pionira instruisto estis s-ro Zhang Zhenzi, vic-estro de tiu ĉi Kolegio, kiu poste fariĝis unua prezidanto de Changzhou-a Esperanto-Asocio. Sub la bazo de tiuj E-kursaroj Changzhou-a E-Asocio fondiĝis. Post la fondiĝo de nia asocio ni funkciigis Esperantajn ekspoziciojn al publiko en kelkaj lokoj ekz. en la Kolegio, palacoj kaj parkoj, kaj poste daŭre okazigis E-kursojn en diversaj lernejoj, elementaj lernejoj, mezlernejoj kaj altlernejoj, kolegioj kaj universitatoj en nia urbo. Tial mi opinias ke E-instruado estas bazo kaj fonto de la loka E-movado.

Rimarkinde, la 15an de aŭgusto de 1985a jaro Ĉina Radio Internacia dissendis al la tuta mondo pri la fondiĝo de Changzhou-a E-Asocio. La aktivaj kaj viglaj esperantistoj-geedzoj Takeŭti kaj s-ro Nisikawa, estroj de Takatuki Esperanta-Societo en Japanio tuj sendis al ni

agrablajn leterojn por esprimi starigon de amikeca rilato kun nia asocio. Ili multe vizitis al nia urbo eĉ ĉiu jare kaj faris multe da aferoj amikecaj kaj kunlaboradoj. Sub la helpo kaj gvido de s-rino Takeŭti Tomiko kaj s-ro Ukida Masaharu (li estis estro de Yosumi) japana elementa lernejo Yosumi ĝemeliĝis kun Dongfang Elementa Lernejo en nia urbo Changzhou. Yosumi fariĝis amikeca lernejo de Dongfang. En Dongfang Elementa Lernejo troviĝas E-kursoj kies instruisto estis mi kiel tiama instruisto de la angla lingvo. Iom post iom sub nia klopodado E-lecionoj kiuj antaŭe estis liberaj kaj interesaj por lernantoj nun jam fariĝis devigaj.

Niaj kunlaborado kaj strebado inspiris kaj helpis du magistratojn Takatuki kaj Changzhou fariĝi ĝemeliĝaj urboj en 1987. Por laŭdo de nia klopodado Takatuki Esperanto-Societo invitis nin viziti al Japanio por partopreni en la 36a Kansaja Esperanto Kongreso(KEK36). Nia tiama prezidanto s-ro Zhang Zhenzi kondukis la delegacion tripersonan de Changzhou-a E-Asocio unufoje vizitis al Takatuki kaj partoprenis en KEK36 en 1988. Mi kiel delegaciano partoprenis ĝin.

Dum pli ol 20 jaroj post la fondiĝo de nia asocio niaj membroj kontribuis multe da laboroj por nia loka E-movado. Ni tempon al tempo funkciigas E-kursojn en Changzhou Normala Kolegio, kies gvidantino estis s-rino Jing Mingxia, Changzhou Tekstia kaj Teknika Altlernejo, kies gvidanto estis s-ro Wang Jian, Changzhou Kemia kaj Teknika Altlernejo, kies gvidanto estis s-ro Liu Guoping, Changzhou Informa kaj Teknika Altlernejo, kies gvidanto estis s-ro Wang Jianjie, Changzhou Qingtan Mezlernejo, kies gvidanto estis s-ro Pan Yajiang, Changzhou Liu Guojun Profesia kaj Teknika Altlernejo, kies gvidanto estas Zhang Qunyan, Changzhou Universitato, kies gvidanto estas Xu Hongsheng. En altlernejoj lernantoj povas gajni du stud-poentojn post finiĝo de E-lecionoj kaj pasiĝo de E-ekzamenoj, samkiel aliaj devigaj lecionoj, ekz. angla lingvo, matematiko, fiziko k.t.p.

E-societo de studentoj establiĝis en Changzhou Liuguojun altlernejo. La studentoj elektis sian estron kaj faris siajn planojn kaj aktivan regulon. En Changzhou Dongfang Elementa Lernejo daŭre funkciigas E-kursojn pli ol 20 jaroj. Nun E-lecionoj jam fariĝas la devigaj lecionoj. Tio signifas ke ĉiuj lernantoj en diversaj gradoj devas lerni kaj koni nian lingvon kaj scion pri Esperanto. La instruistoj kompilas oficialajn kurso-librojn por lernantoj. Fierinde du ĝemelaj lernejoj Dongfang kaj Yosumi daŭrigas sian amikecan rilaton pli ol 20 jaroj. Ili ofte interŝanĝas leterojn, edukaj materialojn kaj lernantajn manfaritaĵojn. Estroj de du lernejoj ofte interŝanĝis spertojn pri edukado kaj pedagogio. Notinde ĉiu nova posedanta estro de du lernejoj devas fari unuan taskon sendi leteron al alifanka por esprimi sian deziron de daŭraj kunlaborado kaj amikeco. En la 1988 kiam nia prezidanto s-ro Zhang Zhenzi gvidis la tripersonan delegacion de Changzhou-a E-Asocio inkluzive de mi vizitis al Takatuki. Kaj mi kiel reprezentanto de Changzhou Dongfang Elementa Lernejo vizitis al Yosumi Lernejo kaj estis varmege akceptita. En la 2010 mi refoje vizitis ĝin kaj ankaŭ akceptis saman bonvenigon.

De tempo al tempo niaj E-kursoj aperiĝis kaj malaperiĝis en diversaj lernejoj. Tio dependas al niaj membroj kaj E-instruistoj. Laŭ disvolviĝo de ĉina ekonomio la popolaro interfluas ofte en diversaj urboj de Ĉinio kaj eksterlandoj. Ankaŭ niaj membroj kaj esperantistoj ofte interfluiĝas. 3 el 7 unuaj estraranoj de nia E-asocio jam iris al alilanden. Instruistoj mankas al la E-movado en nia urbo. Nun en nia urbo ankoraŭ ekzistas tri lernejoj en kiu estis E-kursoj. Tiuj estas Changzhou Dongfang Elementa Lernejo, Changzhou Liu Guojun Profesia Teknika Altlernejo kaj Changzhou Universitato.

Aliflanke nia asocio konsistas el instruistoj, oficistoj, teknikistoj kaj laboristoj en diversaj kampoj, multaj el kiuj lernis nian lingvon antaŭ unu aŭ du jaroj. Tio signifas ke ili multe estas

komencantoj aŭ aliadire instruistoj por komencantoj. En la kampoj de uzado kaj praktikado de nia lingvo la spertoj mankas al niaj membroj kaj malmulte ni faris.

Post fondiĝo de nia asocio ni aktive kaj varme bonvenigas alilandajn esperantistojn kiuj deziras kaj esperas propagandi kaj instrui Esperanton en nia urbo. Ni tempe al tempo akceptis esperantistojn el Koreio, Rusio, Francio, Germanio, Hispanio, Centr-Afriko, Niĝerio, Italio, Svislando, Bulgario, Usono k.t.p, kompreneble ankaŭ el Japanio. Nun ni jam invitis esperantiston s-ro Michel el Francio kiu loĝis en najbara urbo Zhenjiang kiel gasta instruisto. Li ĉiumonate unufoje vizitis al nia urbo por klerigi niajn instruistojn. Ni ankaŭ invitis al s-ro Ma Youngtae (Leono), fama esperantisto el Koreio kaj akademiano de Esperanta Instituto kiel nia gasta instruisto dum li laboris kiel gasta profesoro en Nanjing Universitato. S-ro Ronald J.Glossop, Profesoro Emerita, Sud-Ilinojsa Universitato en Edwardsville, kiu estis eksvicprezidanto de ILEI ankaŭ gvidis la kurson por instruistoj kiam li vizitis al nia urbo.

Oni diras ke la Esperanto- movado en nia urbo estas vigla kaj sana' mi konsentas pri tio, tamen mi bedaŭras ke tio ne signifas ke oni utilas plene Esperanton kiel internacian helpan lingvon kaj utiligi ĝin kie oni esperas.

Esperanto estas internacia lingvo, de la naskiĝo de Esperanto, ĝi utilas al homoj por interkomunikado inter diversaj landanoj kaj faris kontribuon por la interkompreniĝo kaj amikeco de popolanoj de diversaj landoj. La interna ideo de Esperanto igis multajn homojn lerni kaj praktiki tiun lingvon por konstrui unu mondon pleniĝanta de amikeco, de paco kaj de harmonio de tuta homaro.

Resume, ke E-instruado dum pasintaj jaroj en nia urbo ni konscias ke propagando kaj klerigado de nia lingvo Esperanto estas necesaj por disvolviĝo de nia lingvo. E-instruado estas bazo kaj fonto de loka E-movado. Estas grave ke kiel eble plej efike instrui Esperanton al niaj E-instruistoj.

Ni esperas ke post fondiĝo de ILEI-cn ni povas fari grandan kontribuon kaj antaŭenpuŝiĝi por tiu afero.

Podkasto-elsendo -- Kiel komenci ĝin kaj ĝia celo

Yamasita Toshiro (Japanio)

(Sinoptiko de PPT-o)



ĝia celo:

1. kuraĝigi lernantojn
“*ho, mi komprenas bone!*”
2. paroli pri nia orienta vivo
“*jes, mi komorenas nian vivon en Esperanto!*”

“Esperanto estas facila lingvo.” “sufiĉe facila, ke Tojstoj komprenis ĝin post kelkhora lernado”. Sed aŭdante radio-elsendon, nenion komprenas lernantoj, krom “saluton”. Ili ne nur forĵetas Esperanto-lernadon, sed fariĝas kontraŭesp-istoj: “Esperanto estas malfacila.”

kialoj:

1. elsendo estas tro longa
programeroj daŭras 1/2-horo
2. parolo estas tro rapida
vortomulteco - kiel mitralo
prononco - pli ol 5 voka;oj
malsameco de vivo kun Eŭropo

solvoj:

1. mallonga elsendo
en 5 minutoj
2. anstataŭigo de malfacilaj vortoj
facilaj kaj malfacilaj, paralele.
3. klara prononco
en 5 vokaloj
4. en forta/malforta akcento

ne alte/malalte: x POLIcáno
5. paroltemoj en azia vivo
ne pri vivo eŭropeca, sed nia ĉiutaga.
klopodo esprimi azian vivon.
(aziigi Esperanton!)

Radio Ĉerizo <http://paramirado.com/>

rapideco, flueco, vortomultigo,
multaj temoj

Radio Ĉerizo Eduka

klarigo en nacilingvo,
natura rapideco, flueco,
vortomultigo, multaj temoj
(korea, angla, malaja versioj estas preparataj)

diferencoj de interretaj elsendoj:

normala elsendo

konekti al retejo kaj aŭdi.

podkasto

post registri retejon ĉe softvaro,
ĝi aŭtomate detektas novajn
elsendojn kaj elŝutas ilin.

Aperigu multajn elsendojn, kuraĝigu lernantojn, kaj ni aziigu Esperanton, kune.

2011, belmonto (yamasita t.)

Iom da opinioj pri propagando kaj instruado de Esperanto

Miaohui (Ĉinio)

Saluton! Karaj geamikoj!

Mi ege dankas al ĉiuj samideanoj, kiuj ĉeestas ĉi tie por aŭskulti mian prelegon.



Antaŭe mi pretis fari prelegon: Problemoj kaj solvoj de E-instruado en Ĉinio, sed dum la seminario mi trovis, ke tri instruistoj jam parolis pri tio. Do, mi iom ŝanĝu la enhavon de mia prelego. Tio estas multe pli libera.

Antaŭ tio, mi volas fari proponon. Multaj junuloj ofte demandas, kia estas E, Kaj kio estas E, kaj ĉu Esperanto estas utila. Por respondi mi diris: "Jes. Se vi bone mastras Esperanton kiel lingvon vi povas vivteni vin per Esperanto kiel aliaj lingvoj." Multaj junuloj iam lernis la anglan lingvon por diversaj kaŭzoj. Iuj por stud-poentoj kaj iuj por

trovi laboron. Sed en Ĉinio ne ĉiuj lernantoj de la angla lingvo kaj aliaj lingvoj povas trovi laboron. Same, Esperanto tute ne estas senutila kiel aliaj homoj opiniis. Iu mia kursanino diris al mi, ke ŝia revo estas fariĝi instruistino de Esperanto. Fakte ŝi lernis tre bone. Foje ŝi demandis, "Ĉu Esperanto estas utila? Ĉu mi povus fariĝi Esperanta instruistino?" Iu samideano respondis: "Ne, Ĉar en nuna Ĉinio, estas ne multaj esperantistaj instruistoj." Do, ŝi perdis la intereson kaj ankaŭ memfidon.

Mi opinias, ke dum nia propagando de Esperanto, ne nur la idealon de Esperanto, ni ankaŭ propagandu la utilecon de Esperanto. Fakte en Ĉinio estas multaj bonaj ekzemploj, kiel samideano WANG Tianyi, kiu komercas per Esperanto. Kvankam dum nuna tempo li havas malmulte da tempo por propagandi kaj por instrui Esperanton, tamen lia ago bone montras, ke Esperanto estas utila. Multaj estas aliaj ekzemploj de esperantistoj, kiuj sukcesis vivteni sin kaj siajn familiojn per Esperanto. Laŭ mi, en la nuna tempo ni devas propagandi Esperanton ambaŭflanke per la idealo kaj same per la utileco de Esperanto. Tio estas mia propono.

Sekve, mi volas paroli pri mia sperto organizigi E-aferon en Monaĥejo. Laŭ la opinio de aliaj samideanoj, tio estas tute ne eblaj, ĉar mi estas monaĥo, kaj mi ne havas rilaton kun lingvoj. Mi monaĥiĝis en Monaĥejo Tiefosi antaŭ 15 jaroj, kaj poste, mi interesiĝis pri tibeta budhismo, mi do forlasis mian monaĥejon kaj iris al Monaĥejo Duobaosi. Multaj samideanoj scias la nomon, ĉar Duobaosi estas la unua monaĥejo, kiu subtenas Esperanton. La abato de monaĥejo Duobaosi, mia instruisto de Tibeta budhismo, sciis bone, ke mi interesiĝis pri fremdaj lingvoj. Antaŭ ol mi fariĝis monaĥo, mi memlernis la anglan lingvon, la japanan lingvon kaj Esperanton, kaj poste por fariĝi monaĥo, mi forrezignis ĉion. Do, li proponis, ke mi daŭre eklernu la anglan lingvon por iutage traduku budhismaĵojn en la anglan lingvon. Eĉ dum iu kurso, li esprimis sian deziron al ni, sed mi respondis: "Ne, estas tute ne eble por mi uzi la anglan lingvon en tradukado de budhismaĵo. La angla lingvo estas tre malfacila por ĉinoj lerni, kaj eĉ en nia lando ne estas multaj talentuloj, kiuj kapablas verki kaj traduki per la angla lingvo, tamen se vi permesas al mi lerni Esperanton, mi povus tion fari per Esperanto." La abato respondis: "Eble ne. Nuntempe neniu scias pri Esperanto. Eble ĝi ne estas tiel utila."

Kaj poste, dum iu aktivado liberigi suferantajn vivestaĵojn, serpento iniciatis min traduki budhismaĵojn en Esperanton. Ĉar tiu serpento granda kaj dika emociigis min. eble vi legis la sperton en la libro: Postskribo de "amo al la vivoj". Kaj poste mi opiniis, ke ni devas fari ion por savi la kompatindajn bestojn. Mi pensis kion mi faru por helpi ilin. Tiam ideo venis al mi. En la biblioteko de nia monaĥejo estas angla libro de ĉinaj antikvaj rakontoj, rerakontitaj de iu usonano, mi do elpruntis la libron kaj ektradukis ĝin en Esperanton. Poste mi publikigis la tradukon en la retejo. Tiam mi estis estro de monaĥeja retejo, do mi havis rajton por tion fari. Multaj samideanoj eklegis miajn tradukojn kaj tre interesiĝis pri tio. Samideano Zhao Jianping el Ĉina Radio Internacia afable voĉlegis por ni.

Kaj mi ankaŭ fondis interretan kurson de Esperanto speciale por du kursanoj: Xiaoxiao kaj Packoro. En tiu jaro dum la ceremonio por la printempa festo, ili subite vizitis min kun aliaj samideanoj en- kaj eksterlandaj. Unu el tiuj estas S-no Zhao Jianping. Dum ilia renkontiĝo kun la abato, Zhao Jianping diris, ke Miaohui faris Esperantan tradukon sukcesplene kaj li memvole ekvoĉlegis nian enhavon. Aŭdinte tion, nia abato surpriziĝis. Li diris: "Antaŭe Miaohui ofte menciis al ni pri Esperanto. Mi neniam imagis, ke Esperanto estas vere utila." Ĝuste pro tio, li esprimis sian subtenon al Esperanto. Kaj li volis, ke mi fondu tradukejon por budahismaj verkoj. Antaŭe mi ofte parolis pri Esperanto al liaj kolegoj kaj amikoj, sed ili ofte respondis: "Ha, vi denove babilaĉas pri Esperanto", sed tiam multaj amikoj venis al mi por demandi, kio estas Esperanto kaj kia estas Esperanto pro tio, ke ili sciis bone, ke nia instruisto subtenas ĝin. Ĝuste en tiu tempo, mi parolis detale pri kio estas Esperanto kaj kia estas Esperanto. Tio vekis al ili grandan intereson. Ili proponis, ke mi fondu kurson pro tio. Do, mi parolis al nia abato pri la propono okazigi la kurson. Li diris: "Kvankam la monaĥoj konsentas, en tiu tempo ili estas tre okupitaj, eble ili ne povos trovi ŝancon por lerni Esperanton. Tamen, se vi volas, faru provon." Reveninte de abato mi fondis rapidan kurson kaj instruis la bazan gramatikon kaj regulojn de Esperanto nur dum tri vesperoj. Tio ĝojigis miajn amikojn, Ili ĉiam opiniis, ke kvankam ili lernis Esperanton ĉirkaŭ dek jarojn, ili povis uzi nenion, tamen ili supozis, kiel internacia helpa lingvo, Esperanto estus multe pli malfacila, sed lerninte nian kurson, ili sciis, ke Esperanto estas tiel facila. Ili volis eklerni nian lingvon.

Ĝuste tiam mi legis informon senditan de Trigo pri Dennis, kiu volis trovi lokon en Ĉinio por propagandi sian BEK-metodon por instruado. Mi sendis inviton al li eĉ sen peti permeson de nia abato. Ĉar tiam mi opiniis, ke estas tute ne eble por li elekti Duobaosi. Sed fakte jes. Ĵus antaŭ lia alveno, mi raportis tion al nia abato. Kaj li tuj konsentis, dirante: "Bone, se sinjoro Dennis volas loĝi en monaĥejo, tio estas en ordo, tamen se li ne volas, do la monaĥejo pagos por liaj loĝado en hotelo kaj manĝado en restoracio. S-ro Dennis estis invitita al Duobaoshi, kaj li loĝis kaj manĝis kune kun ni. Li donis kurson dum 20 tagoj. Poste mi finis la restintajn lecionojn de li pri la BEK-kurso. Ĉirkaŭ 4 kursanoj lernis ĝis la fino. El la kursanoj iu monaĥo lernis tre rapide, tuj post la rapida kurso BEK-kurso, li enĉinigi E-novelon "Ivan, la malsaĝulo" kaj ankaŭ li legis libron "Kanto de juneco". Sed poste li ekvolis legi ĉinan klasikan romanon "La ruĝdoma sonĝo". Do tio venigis al la monaĥejo nian E-aktivadon kaj aktivado estas ege subtenita en la monaĥejo.

Antaŭ 3 jaroj, mi revenis al Monaĥejo Tiefosi, kie mi monaĥiĝis. Tiefosi estas ĉe Xi'an urbo. En Monaĥejo Tiefosi ni agas pli libere. Post unu jara preparado, mi okazigis E-kurson en Tiefosi,

kaj en tiu jaro samideanoj de ĉirkaŭ 6 landoj vizitis la monaĥejon. Tio vekis atenton de lokanoj kaj ankaŭ de lokaj registaroj. Antaŭe ili opinis, ke ĉiuj eksterlandanoj parolas la anglan lingvon, sed ekster ilia atendo, ke la eksterlandaj gastoj parolas Esperanton anstataŭ la anglan. Multaj homoj iris al la monaĥejo por scii, kio estas Esperanto. Do ili ekinteresiĝis pri Esperanto. Ĉar en nia gubernio nur Tiefosi ofte akceptas viziton de eksterlandaj amikoj, tio ankaŭ vekis subtenon de lokaj registaroj. La estro kaj vicedestro de la gubernio ankaŭ ofte vizitis Tiefosi kaj ekde tiam ili ofte demandis, ĉu estas eksterlandanoj en monaĥejo, kaj ĉu mi eldonis novajn tradukojn, ktp. Se mi havas novajn tradukojn, ili ofte petis de mi. Se ni mencias pri Tiefoshi en Shaanxi provinco, multaj homoj scias, ke en Tiefosi viglas la E-afero.

Ĵus antaŭ kelkaj tagoj estro de la gubernia registaro faris viziton al la monaĥejo kun multaj homoj. Vizitinte la halojn kaj statuojn, ili speciale volis, ke mi faru paroladon pri Esperanto. Mi do ekklarigis ĉine. Sed ili ankaŭ volis aŭdi la prononcon de Esperanto, kaj petis ke mi parolu Esperante. Ĝuste tiam Zongli estas en la gastejo, do ŝi memvole interpretis mian esprantan paroladon en ĉinan lingvon, kio kontentigis la gastojn kaj ĉe la foriro iu speciala viro kaptis Zongli kaj faris multajn demandojn, kvankam jam venis al ili la tempo por foriri, ŝajne li ankaŭ havas multajn aferojn por scii. Poste iu rekonis, ke li estas estro de la provinca registaro.

Jen mia sperto pri propagando kaj aplikado de Esperanto. Mi opinias, ke en la nuna tempo ne mankas propagandantoj de Esperanto, fakte ege mankas aplikantoj de Esperanto. Nun nuraj propagandoj de Esperanto kutime ne facile kredigas aliajn homojn, ke Esperanto estas utila, sed se ni vere faras ion pere de Esperanto, oni povas vidi la utilecon de Esperanto.

Mi ankaŭ opinias, ke en nuna tempo la metodoj por instrui Esperanton devas esti diversaj, kaj por eduki diversajn homojn ni devas fari klopodon por provi pli taŭgajn metodojn kaj trovi pli taŭgajn librojn. Kompreneble, en la nuna tempo estas plej grave elbaki pli taŭgajn instruistojn.

Prof. Zhou Liuxi skribe liveris sian disertaĵon al la seminario. Pro manko de tempo, li ne prelegis dum la seminario.

Kiel Orientuloj Povas Utiligi la Internaciecon de Esperanto?



Zhou Liuxi (Licius), Profesoro de Pekina Instruisto-Universitato

zhouliuqi@yahoo.com.cn

Esperanto, kiel internacia lingvo, devas esti taŭga por la uzo de ĉiuj nacioj. Kaj ĝi fakte estas tia, ĉar ĝi havas strukturon internacian kaj malferman ekde la komenco de sia vivo. En nia uzo de Esperanto ni orientuloj povas (kaj devas) plene utiligi tiun ĉi econ de ĝia strukturo. Nature tio dependas de nia profunda kono de ĝia gramatiko kaj vera enpreno de ĝia spirito.

I. La Internacieco de Esperanta Strukturo

Kiel internacia helplingvo Esperanto havas internaciecon en sia strukturo. Tamen ne estas pure-pura, cent-procenta internacieco. En la historio de la movado de internaciaj helplingvoj, estis multaj projektoj de “filozofiaj lingvoj” kun plena internacieco; tamen ili ĉiuj fiaskis. Sukcesis nur kelkaj projektoj kreitaj surbaze de eŭropaj lingvoj, kaj nur nia lingvo travivis la tempon. Do, kie troviĝas la internacieco de nia lingvo, se ĝia strukturo estas ĉefe elĉerpita de eŭropaj lingvoj?

En moderna tempo eŭropaj lingvoj fakte kovras la plejparton de la mondo. Sekve ĉiuj internacia lingvoj artefaritaj devas imiti eŭropajn lingvojn, kio supozeble signifas internaciecon. Esperanto jam faris tion en la plej bona maniero. Sed feliĉe ĝia kreinto ne blinde imitis eŭropajn lingvojn entute. Li estis saĝa ke li samtempe elprenis kelkajn elementojn de aliaj lingvoj. Krome estas regulo ke oni povos elprunti naciajn vortojn aŭ eĉ krei novajn vortojn se necese. Tiu ĉi regulo povas esti utiligita iusence ankaŭ en sintakso, kiu donos spacon por esprimoj ne trovitaj en eŭropaj lingvoj.

En vort-farado, vere, Esperanto ofte imitas eŭropajn lingvojn, ekz. *vidalvide* (面对面地) imitas la francan lingvon. Tamen, kiam ni lernas Esperanton, ni ne certe scias (kaj fakte ne estas necese scii) de kie ĉiu esprimo venis. Verŝajne la kreinto de nia lingvo kaj famaj aŭtoroj jam elektis, en la komenco, la plej taŭgajn esprimojn el naciaj lingvoj. Ni devas esti lertaj en nia kompreno de la pravecon de Esperanto, kio ne estas problemo en plej multe da tempo. Ekz. la francan *beau-frere/ belle-soeur* (angle, *step-brother/ step-sister*) estas vic-frat(in)o en nia lingvo, kiu estas simpla kaj taŭga.

Fakte, estas multe da Esperantaj vortoj kies strukturo eliras el la limo de sola lingvo eŭropa. Do, ni azianoj povas utiligi tian ŝancon en nia kreado. Kunmetitaj vortoj estas bonaj ekzemploj por nia konsiderado unue.

Oni povus diri, ke kunmetitaj vortoj estas la plej simplaj vortoj. Sed jam ĉi tie Esperanto montras sian bonecon. Ekzemple, en multe da nomoj troviĝas fakte du eblecoj por elekto: vort-grupo aŭ sola vorto. Ĉu Nova Jorko (angle: *New York*) aŭ Novjorko? Ĉu Nova Zelando (angle: *New Zealand*) aŭ Novzelando? En la paroj ambaŭ nia lingvo elektis la duan esprimon, kiu estas mallonga. Tamen la esenco estas, ke ĝi (ekz. Novjorko) estas koncepto, ja sola nomo por unu kaj sola loko! Ni ne bezonas nomon Nova Jorko, kiu almenaŭ estus du konceptoj reprezentitaj de du vortoj (kvankam ili nepre devas esti kombinitaj por fari esence unu

koncepto).

Simile, ni havas vortojn novedzino (新娘, *bride*) kaj novedzo (新郎, *bridegroom*). Oni povas tuj vidi, ke vortoj kiel la anglaj *bride/bridegroom* estas iom fremdaj kaj malfacilaj, ĉar oni ne povas tuj kompreni de la simpla radiko aŭ la kunmetitaj elementoj la veran sencon de la vorto.

Do, se iu subite vidos la vorton novhomo kaj ne ĝin komprenos, li ne devas timi aŭ kapturri: ĝi estas koncepto en antropologio, same kiel rekthomo (*homo rectus* 直立人): novhomo (*homo novus* 新人) estas nova specio de io (*homo sapiens*, saĝ-homo 智人) inter rekthomo kaj homo – kompreneble pli proksima al ni homoj. Kaj nun por reiro al la afero de geedziĝo: la “nova homo” (“新人”: novedzo aŭ novedzino, ĉine ankaŭ) devas esti tiel vokita, sed ne “novhomo”! (Atentu!)

Ni havas multe da simplaj kaj interesaj esprimoj: ĝisnuna (迄今为止的), entute (总体上, 总而言之), senpage (免费).....

Per kombinado de relativaj vortoj kaj aliaj elementoj ni havas tre flekseblajn esprimojn: por-ĉiama (永远的, 永久性的), ĝistiam (直到那时为止的), kiamaniere (用什么方式), tiamaniera (那种方式的), iomete (一点点).....

Tiaj vortoj estas rekte formitaj sur logiko, kies sencoj estas tre klaraj.

Kelkdekfojaj (几十次的) estas facile uzebla por ĉinoj; tamen ankaŭ eŭropanoj povas ĝin akcepti sen malfacilo.

En ununura (唯一的), tutplene (完全), la du elementoj kun simila senco helpas unu alian por plifortigi la sencon, kio estas rara en eŭropaj lingvoj. Tamen eŭropanoj povas tuj kompreni kaj akcepti ilin. Plenplene (完完全全), pli forta kaj vivida, estas pli rara en eŭropaj lingvoj; simile, ververe (真真, 真正), finfine (未了), eteta (小小的). Sed oni povas diri, ke ili estas certe pravigeblaj.

Kiam ni vidas:

La edzino sendube superas lin multemulte en la talento [《Amo kaj Morto》(A-M) p.145] (妻子无疑在才能上超

越他许许多多),

ni povas tuj akcepti la vorton multemulte. Kaj per analogio:

La mizeran faŭston ĉirkaŭis multemultaj mefistofeloj kaj mefistofelinoj. [A-M149] (许许多多魔鬼和女妖包

围着可怜的浮士德。)

Ĉinoj povas facile akcepti la vorton permane (手把手地) en:

Ili, inkluzive la edzinon, estis edukitaj kaj preskaŭ **permane** kondukataj de li sur la parnason. [A-M 146]

(他们, 包括他自己的妻子, 都是经他几乎手把手地教诲和引导而走上诗坛的。)

Sed, vorto kiel fuŝfuŝe ne troveblas eĉ en la ĉina lingvo:

...lian **fuŝfuŝe** elkneditajn infanverkojn [A-M 149] (他的那些胡乱拿捏出来的幼稚之作)

Tamen ne nur ĉinoj povas ĝin kompreni, ankaŭ eŭropanoj povas.

La vorto verdire povas esti pravigebla. Oni ne demandu, kie ĝi troviĝas en lingvoj eŭropaj aŭ ne-eŭropaj.

II. La Akordigebleco, fleksebleco kaj malfermeco de Esperanto

La ebleco de la supra uzado estas decidita de la eco de nia lingvo. Estas kelkaj lingvo-tipoj en la mondo: infleksiaj lingvoj (eŭropaj lingvoj), aglutinaj lingvoj (altajaj lingvoj) kaj morfem-liberaj lingvoj (ĉina, vjetnama...). Aglutineco estas ĝenerale facila por lerno kaj uzo. Kvankam Esperanto baziĝas sur infleksiaj (eŭropaj) lingvoj, ĝi enprenis la principon de aglutineco en sia vort-farado, ekz. **Mal-san-o-j-n** (pli plene aglutineca ol *ill-ness-es* en la angla, kiu ne ĉiam uzas aglutinecon).

En la 16 reguloj de Esperanto ne estas sintaksaj reguloj, ĉar multe jam estas nature kompreneblaj por eŭropanoj. Kiel orientuloj, ni devas distingi inter kio estas taŭgaj por eŭropaj lingvoj (kaj ankaŭ Esperanto devas sekvi tion) kaj kio estas flekseblaj (kaj sekve povus esti disponitaj de ni, ne-eŭropanoj).

La supraj ekzemploj eblas, ĉar ties ebleco estas decidita de la eco de Esperanto.

Estas aparte remarkinde, ke la baza gramatiko Esperanta difinas la gramatikajn finaĵojn de ĉiuj vort-klasoj, kaj permesas la liberan uzon de ĉiuj morfemoj kiel sendependaj vortoj. Tio ne troveblas kaj pravigeblas en ĉiuj lingvoj; tamen ĝi jam malfermas la pordon por la transformadon inter vort-klasoj kaj ilia laŭbezona uzo, ĉar oni povas facile kaj flekseble kombini regulojn de morfologio kaj tiujn de sintakso.

En ĉiutaga lingvo ni jam havas kelkajn esprimojn, en kiuj morfologio kaj sintakso estas akordigitaj flekseble. Ekzemple la uzo de substantivo kiel verbo:

Mi **tagmanĝas** je la dek-dua. (我十二点吃午饭。)

Kiom **aĝas** ŝi? (她年龄多大了?)

Foje kaj refoje oni renkontas vortojn en Esperanto kiuj egalas vortgrupojn aŭ pli grandajn unuojn en naciaj lingvoj:

Antaŭdankon! (先致谢忱, *Thank you in anticipation*) [bela esprimo!]

Li skribis tion **vole**, sen trudiĝo. (他是自愿写的, 没有谁强迫他。)

Li **volonte** venis. (他自愿来了。/他很乐意地来了。)

Oni povas preni kafon aŭ teon **laŭvole**. (大家可按个人自愿用咖啡或是用茶。/大家可随意喝咖啡或者喝茶。)

[Laŭvole/ laŭvola ne egalas la anglan *at will* aŭ la ĉinan 随意, sed estas pli taŭga ol ili.]

Li diris tion kontraŭvole. (他违心地那样说了。)[pli simpla ol angle *against one's own will*]

Li...malgraŭvole sulkigis siajn brovojn. [A-M 145] (他不由得皱起了眉头。)

La larmoj pretervole fluis ĉe li sur la vangoj. (他情不自禁泪流满面。)

Vole ne vole li devas cedi. (不论他愿意还是不愿意, 他都必须让步。/他不得不让步。)

Tio vole ne vole devigus lin esti hipokritulo. (那必定会迫使他成为伪君子。)[Rimarku, ke **tio** ne estas homo, do tute ne temas pri volo. Tiu ĉi uzo montras la plivastan utilecon signifanta 'certe' de tia esprimo.]

En la korea verko《Se mia vivo aŭtuniĝos...》, oni vidas aŭtuniĝos. Tamen ĉu ĝi estas gramatike ĝusta? Ni pensas, ke Jes. Kompare kun mia traduko: Timas mi, ke maljuniĝos la belulin' (《离骚》：“恐美人之迟暮”), la kreema esprimo Se mia vivo aŭtuniĝos estas pli kuraĝe libera.

La Esperanta traduko de “西风烈, 长空雁叫霜晨月”(毛泽东) :

La okcidenta vento furiozas,

Sovaĝ-anseroj gakas en la spac' sub luno prujn-matena.

estas pli preciza ol la angla traduko

Fierce the west wind,

Wild geese cry under the frosty morning moon.

Kvankam *fierce* aspektas pli proksima al la origina ĉina vorto (烈, adjektivo kiel predikato), tamen tio ne taŭgas por la angla (kiu ne uzas adjektivon kiel predikaton). Kaj furiozas estas verbo, sekve pli bona.

En ĉiuj ĉi ekzemploj ni povas vidi penon flekseble uzi nian lingvon.

III. Provu Teni la Spiriton de Nia Lingvo Internacia

Tamen, por vere disponi nian lingvon ni devas kapti kaj teni la spiriton de Esperanto. Tiu spirito estas la internacia stilo de nia lingvo, bone difinita de Zamenhof. Se ni bone lernas kaj pensas, ankaŭ ni orientuloj povas posedi internacian stilon kiam ni uzas Esperanton.

Ĉiu kreado devas esti farita surbaze de la fundamenta gramatiko, kio ja estas la plej grava principo.

Ni nun rigardu, kiel japana aŭtoro uzas Esperanton kreante ion en sia verkado, eble tio povus doni al ni bonan inspiron.

Li aperigis sur sia vizaĝo amaran rideton. [A-M 148] (他脸上露出一丝苦笑。)

Li konfuzita pretervole ekfermis sian buŝon, kiu ĉiam tremetas pro io, eble pro rimorso ŝajne persekutanta lian konsciencon, kvazaŭ li sidus sur mato el pingloj. [A-M 149] (他心慌意乱, 不由自主地立刻闭上嘴巴; 那嘴巴不知为什么一直微微颤抖着, 也许是因为内疚隐隐谴责着他的良知, 使他如坐针毡。)

Se la ideo venis al tiu punkto, ...li ĉiam sentis sin kvazaŭ drasita de la dorso. [A-M 145] (每想到这一点, 他都感到难受, 有如芒刺在背。)

Kiam ŝia voĉo lin atingis, ĉiun fojon li sentis sin kvazaŭ rostata sur pato. [A-M 151] (每次听到她的声音, 他都难受得像在热锅里受煎熬一样。)

En tiuj ĉi ekzemploj ni povas vidi tre vividan uzadon de nia lingvo. Tamen, kial japana aŭtoro povas esprimi tiamaniere, foje almenaŭ uzante essence ĉinajn idiotismojn? Mi sugestas, ke ni ĉinoj ne kuraĝus tiel esprimi, ĉar ni timus ke tio irus kontraŭ eŭrop-lingva kutimo. Ni serĉu la kialon.

En la unua ekzemplo, ni ne scius, ĉu ni povus diri ‘maldolĉa rideto’ (angloj uzas ĝenerale ‘*a forced smile*’ kaj ne ‘*a bitter smile*’). Eĉ se ni kuraĝe pruntu tian ĉinan esprimon, ni eble uzas rekte ‘maldolĉa rideto’ kaj ne ‘rideto’. Tamen per la formo rideto, la intencita nuanco povas esti sentita; cetere, amara estas elegenta vorto, kiu implicas eble ion metaforan. Se la japana aŭtoro ja tiel pensus, li sentus rajton krei ion; do amara rideto povus esti taŭga esprimo! (Kaj nun, en la ĉina traduko ni povas aldoni ‘一丝’ al 苦笑 por esprimi la nuancon ‘rideto’.)

Rimarku, ke sub lia plumo, la ŝajne ĉinaj esprimoj estas uzitaj en subjunktiva modo: kvazaŭ li sidus sur mato de pingloj, ktp. Tial, tute ne estos problemo; ĉar oni povus uzi ĉinan metaforon aŭ alian strofon. Tio montras, ke la profunda kompreno kaj vera enpreno de la fundamenta gramatiko estas tre gravaj.

La esprimo li sentis sin kvazaŭ rostata sur pato (他难受得像在热锅里受煎熬一样) povas esti facile komprenebla. Se tial, ni ĉinoj povus turni nian idiotisman esprimon “急得像热锅上的蚂蚁” (‘turmenti kvazaŭ formiko en varmega potoj’) ankaŭ en ‘(turmenti) kvazaŭ (formiko) rostata sur pato’.

Nun, konsideru la frazon li ĉiam sentis sin kvazaŭ draŝita de la dorso, en kiu draŝi (‘打谷子’) estas flekseble ekspluatita. En Esperanto jam ekzistas esprimo draŝi la dorson ([像打谷子那样]抽打背部); la aŭtoro ĉefe aplikas tiun esprimon, tamen li ankoraŭ uzas ĝin post la subjunktiva kvazaŭ. Bone, saĝe kaj sekure! Kaj verŝajne ni povas traduki ĝin en la ĉinan idiotisman esprimon “有如芒刺在背” (‘kvazaŭ pikita de domoj sur la dorso’). Plie, reen, kiam ni volas esprimi ion similan al “有如芒刺在背”, ni povas diri: kvazaŭ pikita de dornoj sur la dorso.

Nun, mi parolu pri problemoj por konsiderado. Se ni volas preni la spiriton de Esperanto...

Oni devas ĉiam esti gardema, ke oni maksimume sekvu la tradicion de la fundamento de la Esperanta gramatiko kaj uzu jam ekzistantajn esprimojn idiotismajn.

Ekzemple, ni ĉinoj kutime priskribas timemulon kiel “胆小如鼠”(‘timema kiel muso’). Do, ĉu ni povas diri “tiel timema kvazaŭ muso” en Esperanto? Laŭ mia opinion ni rajtas tiel diri, ĉar gramatiko permesas, ke oni povas ĉiam esprimi metaforan sencon en subpropozicia strukturo. Tamen, ĉu ni povas uzi ankaŭ la supozeble pli mallongan esprimon ‘muskora’? Ĉe tio ni devas esti pli prudentaj kaj gardemaj; ĉar ni devas scii, ke jam estas preskaŭ fiksita esprimo leporkora (胆小[如兔]的) en Esperanto. Se ni vidos, ke alia homo uzos leportimema, ni povos senti, ke ĝi estos natura; ĝi havas preskaŭ saman sencon de leporkora, kaj estas pli viveca. Do, tial, estus ne taŭge (kaj ne necese) por ni aldoni iun novan esprimon ‘mus-timema’ (kiu eble ne estus bonvena).

En ne-rekta citaĵo, oni havas sufiĉe liberan spacon por nova enkondukado aŭ kreado, kiel montros la suba ekzemplo:

La ekstera malamiko povus esti frakasita, sed la interna---por ĉiam restas nevenkebla,diris antikva ĉina filozofo![A-M 148] (外敌易破，内奸难防，中国古代哲人说过。)

Tia esprimo estas akceptebla, kvankam pli bone oni povus skribi: “La ekstera malamiko povus esti facile frakasita, sed la interna por ĉiam restas nevenkebla,---diris antikva ĉina filozofo!”

Estas ĉiam problemoj por ĉinoj (se ne por azianoj). La ŝajne simpla afero, ordo de vortoj aŭ morfemoj, ne estas simplaĵo por ni! Ekzemple, la antaŭecitita verdire, kiu malfacile troveblas en naciaj lingvoj, devas esti bone komprenita. Se kreita de ĉinoj, ĝi povus esti *‘dirvere’(‘说+真的’, angle *to tell the truth*), kio estas erara.

Same, “吃人的野兽” devas esti hom-manĝanta besto, sed ne *‘manĝhoma besto’. Mi libere kreis ‘ĉinminacismo’(中国威胁论) por kritiki malbonulojn kontraŭ Ĉinio. Ĝi estas gramatike ĝusta, sekve tuj komprenita kaj akceptita de alilandanoj.

Ni ĉinoj povas havi malfacilaĵojn kiam ni devas uzi kelkajn vortojn por modifi la centran vorton. En la suba frazo, ni devas diri antikva ĉina filozofo, sed ne *‘ĉina antikva filozofo’ por 中国古代哲学家. Simile, “那本蓝色的新书” devas esti tiu nova blua libro (sed ne *‘tiu blua nova libro’); “几个美洲老朋友” devas esti kelkaj malnovaj amerikaj amikoj (tamen ankaŭ eblas kelkaj malnovaj amikoj el Ameriko). Ĉinaj Esperantistoj devas bone kompreni tion. Do “我的所有书籍” estu ĉiuj miaj libroj; “我全家人” estu ĉiuj miaj familianoj (tamen ankaŭ eblas mia tuta familio‘我全家’). Rimarku, ke oni uzu ĉio ĉi tio por “这一切”. Do, eĉ vort-ordo restas grava afero!

Multe da gloraj taskoj atendas nin, orientajn Esperantistojn. Kiel ordinaraj Esperantistoj aŭ Esperanto-instruistoj, ni devas ĉiam lerni, uzi, kaj krei en Esperanto kaj bone kombini la tri taskojn en nia tuta kariero esperantista. Tio estas signifoplena por ni mem, kaj por Esperanto!

RESUM-RAPORTO

La 1-a ILEI-Konferenco okazas en la urbo Tianjin (Ĉinio) inter la 12-a kaj la 15-a de aŭgusto. Aliĝis pli o 70 personoj el 5 landoj (Koreio, Japanio, Mongolio, Brazilo kaj Ĉinio. La seminaria temo estis 'Kiel efike instrui Esperanton al Azianoj'.

La programo estis riĉigita de kontribuoj de

LEE Jungkee el Koreio: 'Esperanto-kurso kaj ĝia instruo-metodo en Koreio',
PARK Yongsung el Koreio: 'Muron de vortoj. Kiel transsalti azia lernanto.',
ISIKAWA Tiekio el Japanio: 'Malfacilaĵoj por japanoj en la lernado de Esperanto',
WANG Minhao el Ĉinio: Miaj pensoj pri Esperanto-instruado;
Yamasita tosihiro el Japanio: podkasto-elsendo -- kiel komeci ĝin kaj ĝia celo
GONG Xiaofeng el Ĉinio: Ĉu azianoj povas paroli Esperanton ene de monato?
HAN Zuwu el Ĉino: Kiel altigi la Esperanto-nivelon de ĉinoj?
LI Weilun el Ĉinio: Esperanto-instruado en ĉinaj altlernejoj
Huĝimoto Ricko el Japanio: Esp-kurso de Ikedakita-Supermezlernejo
ZHANG Changshengel Ĉinio: Instruado de Esperanto en Urbo Changzhou;
Miaohui pri 'Tom da opinioj pri propagando kaj instruado de Esperanto'.

En la posttagmezo de la unua seminaria tago, okazis du demonstraj kursoj de Huĝimoto Ricko (el Japanio) kaj WANG Minhao (el Ĉinio).

Ekskursoj kaj vespera kaj duontaga permesis al la ĉeestantoj konatiĝi kun la urbo Tianjin.

La samlokeco de la Seminario kun la somera E-kursaro organizita de ILEI-CN donis la okazon al la kursanoj renkontiĝi kun spertaj instruistoj enlandaj kaj eksterlandaj.

La sekcioj de Ĉinio, Japanio kaj Koreio kunsidis dum la seminario. Ĉeestis 20 reprezentantoj el 5 landoj. ILEI-anoj diskutis pri eventuala kunlaboro en kampoj komunaj.

La ĉefaj decidoj de la tri sekcioj estas la jenaj:

- Akcepto de la reta kunlaboro inter 3 sekcioj, per Fejsbuko, skajpo, ka.
- La sekva ISOA okazos en Kunming, kadre de la 45a ILEI-konferenco, informoj pri ĝi aperos poste.

Samtempe 13 instruistoj de mezlernejoj kaj elementaj lernejoj, kiuj instruas Esperanton en siaj lernejoj, kunsidis por interŝanĝi spertojn kaj diskutis pri kunlabor-manieroj.

La Ĉina sekcio ankaŭ okazigis sian labor-kunvenon dum la seminario. 18 membroj partoprenis kaj varme diskutis pri la aranĝoj de Kunming konferenco, 2012.

Sendis al ni gratul-mesaĝojn

Ĉina Esperanto-Ligo kaj El Popola Ĉinio,

Ĉina Radio Internacia,

S-ro Stefan MacGill, prezidanto de ILEI,

S-rino Mirejo, prezidanto de internacia ekzamena komisiono, prezidanto de Svisa ILEI sekcio,

S-ro Radojica Petrović, ILEI-estrarano pri edukprojektoj kaj konferencoj,

S-ro Augusto Casquero, Prezidanto de Valencia Esperanto Federacio (Hispanio),
S-ro Renato Corsetti, eksprezidanto de UEA,
Profesoro Ronald Glossop, Prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE),
Sekciestro de ILEI por Usono kaj Kanado;
S-ino Tan Xiuzhu, eks-prezidanto de Ĉina E-ligo,
Ĉina fervojista E-asocio; Pekina E-asocio; Hainan-a E-asocio; Jiangxi-a E-asocio; Xi'an
E-asocio, Dandong-a E-asocio, Changzhou-a E-asocio, kaj ankaŭ de aliaj organizoj kaj
personoj enlandaj kaj alilandaj.

Ĉina Radio Internacia sendis sian raportistaron al nia seminario kaj faris koncernajn
raportojn ĉe sia ĉefpaĝo. <http://esperanto.cri.cn/581/2011/08/11/Zt1s127168.htm>

Karaj geamikoj, baldaŭ nia seminario fermiĝos, Je la nomo de Komunaj Organizantoj – la
ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI, mi elkore dankas al vi ĉiuj. Speciale, mi estas dankema al
niaj komunaj gastigantoj, Tianjin E-Asocio kaj Tianjin Fremdlingva Universitato. Por sukcesigi
nian seminarion, ili laboregis tra monatoj.

Mi dankas ankaŭ iun samideaninon el Koreio kaj iun pekinan esperantiston, kiuj kune
mondonacis al nia seminario por la lupago de la konferencejo. Korea sekcio aparte mondonacis
al la seminario, kaj ankaŭ S-rino Ricko Huĝimoto kaj Belmonto el Japanio. Koran dankon pro
ilia subteno.

Karaj gesamideanoj, post la seminario ni hejmeniros, mi elkore bondeziras al vi ĉion bonan
kaj bonan vojaĝon.

Koran dankon pro via atento.

GONG Xiao-feng
sekciestro de ILEI-CN

ILEI-SEKCIOJ AKTIVIĜAS EN PLIA RENOMA UNIVERSITATO

Post la sukcesa 44a Konferenco en renoma kopenhaga universitato, ILEI tuj aktiviĝas en orienta Azio. De la 12a ĝis la 15a de aŭgusto 2011, iniciate de la ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI, la 1-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA) okazis en la renoma Tianjin Fremdlingva Universitato en Ĉinio, kun pli ol 70 partprenantoj el Koreio, Japanio, Mongolio, Brazilo kaj Ĉinio, el kiuj troviĝis pli ol 30 junulaj, precipe studentaj vizaĝoj.

Je la 9a horo en la 12a de aŭgusto, la seminario estis malfermita. Prof. Dr Arko, ĉina sekciestrino de ILEI, korea sekciestro s-ro Lee Jung-Kee kaj komisiitino de japana sekcio, s-ino Huĝimoto Ricko salutis seminarianojn. Arko laŭtlegis salutvortojn de la prezidanto de ILEI, s-ro Stefan MacGill. S-ro Wang Minhao el Ĉinio laŭtlegis salutajn vortojn el vicprezidanto de ILEI s-ro Radojica Petroviĉ, eksprezidanto de UEA d-ro RenatoCorsetti, s-ino Grosjean Mireille, ĈEL, EPĈ, la Ĉina Radio (ĈRI) kaj aliaj.

Post la inaŭguro, tuj komenciĝis la ĉefaj programoj/prelegadoj. Pli ol 10 seminarianoj faris prelegojn. S-ro Lee Jungkee unue prelegis pri “Esperanta Kurso en Koreio kaj ĝia instrumetodo”; li prezentis la esperantan edukon situacion, proponis pli bonan instrumetodon el sia sperto, ekzemple, kiel efike varbi, pli bone instrui ktp. Per la Zamenhofaj vortoj li resumis sian sperton: ni semas, semas kaj semas. S-ino Arko faris prelegon kun la titolo “Ĉu al azianoj eblas paroli Esperante ene de monato?”. Ŝi proponis la BEK-kurson kreitan de s-ro Dennis Keefe, montris multajn fotojn el la unuaj kaj duaj Vintraj Esperantaj Kursoj en Ĉinio kiujn ŝi kaj li gvidis kune. La kursanoj perfekte flue parolis Esperanton ene de monato, kondiĉe ke temis pri junaj gestudentoj kiuj jam lernis eŭropan lingvon. S-ro Wang Minghao faris prelegon kun la titolo “Miaj pensoj pri Esperanto-Instruado”. Li atentigis la gravecon por konigi al lernantoj la celon de esperanta instruado kaj la internan ideon de Esperanto. Poste li demonstiris instruajn metodojn kune kun s-ino Huĝimoto Ricko el Japanio. La demonstroj forte allogis seminarianojn, precipe la junulojn. S-ro Nema el Koreio faris prelegon “Muron de vortoj, kiel transsalti azia lernanto”. Li diris, ke por eŭropanoj, 60-70% vortoj el PIV estas familiecaj, kaj por azianoj, preskaŭ 100% el la vortoj estas nerekoncibleblaj. Li diris, ke instruistoj devas liveri por aziaj kursanoj vortlistojn kaj vortkestojn laŭ ofteco. S-ro Tiekio el Japanio kun la titolo “Malfacilaĵoj por japanoj en la lernado de Esperanto”, prelegis pri la karakteriza sinteno de japanoj por lernado de fremdaj lingvoj ĝenerale kaj de Esperanto, pri diversaj malfacilaĵoj kaj problemoj en la lernado de Esperanto, kaj rimedoj/manieroj pli taŭgaj por la plialtigo de komunikkapablo al lernantoj. S-ro Li Welun el Ĉinio kun la titolo “Esperanto-instruado en ĉinaj altlernejoj”, diris, ke la plej efika instruado de Esperanto okazas en altlernejoj. S-ro Belmonto el Japanio prezentis esperantan Radio-Ĉerizon (<http://paramirado.com>), kaj instruis metodon por aŭskulti kaj registri paroladon. S-ro Zhang Changsheng el Ĉinio prezentis sian sperton pri instruado de Esperanto en diversaj lernejoj kaj ĝia praktiko por Ĝemeligi la Elementan Lernejon *Dongfang* kun japana Elementa Lernejo *Yosumi*. S-ro Han Zuwu el Ĉinio kun la titolo “Kiel altigi la Esperantan nivelon en Ĉinio”, analizis la ĉinan lingvan nivelon kaj problemaron, kaj montris metodon altigi la Esperantan nivelon. S-ino Huĝimoto Ricki el Japanio prezentis sian supermezlernejon, kie ŝi instruas Esperanton. S-ro Miaohui, majstro de ĉina monaĥejo, analizis la situacion de ĉina esperanta instruado kaj aldonis solvajn vojojn.

Dum la konferenco okazis kunsido de la tri landaj sekcioj, ankaŭ mongoliaj kaj brazilaj kolegoj partoprenis. Oni decidis ke la 2a ILEI-seminario en Orienta Azio kiel speciala programero paralele kunokazos kun la 45a ILEI-konferenco, tamen kun nur 4 horoj por du serioj. La Kunsidantoj proponis DVD-kursojn,

skajpo-kunligon inter landaj ILEI-sekcioj, komunajn E-kursojn kaj kunlaboron por bone gastigi la 45an konferencon en Ĉinio. S-ro Lee Jungkee diris, ke se la konferenca preparo malsukcesus, ankaŭ koreaj kaj japanaj kolegoj hontus. Kunsidis ankaŭ ĉinaj ILEI-membroj. Ĉe la fermo de la seminario, s-ro Trezoro, la sekretario de ILEI, faris paroladon, raportis pri la sukcesa konferenco en Kopenhago, esprimis pretecon de ILEI kunlabori kun esperantaj kaj ne esperantaj personoj kaj organizoj, kaj prezentis dankajn vortojn al la kvinlandaj kolegoj.

Malsamaj naciuloj kun kvin gepatraj lingvoj parolis la komunan lingvon Esperanto, ĝuis harmonian etoson, amuzajn interkonajn vesperojn, gajajn tostojn, kunfotadojn, vesperajn rigardojn en la urbo, noktan boatan ekskurson sur rivero Haihe, kantojn, dancojn, grupajn ludadojn, amikecan babiladon, duontagan ekskurson tra la urbo kaj dutagan ekskurson ĉirkaŭ la urbo. S-ino Ojumceceg el Mongolio aparte instruis la metodon manfari belajn kaj interesajn hundetojn, ĉevalojn, tigrojn kaj diversajn artaĵojn, kiuj ege plaĉis al la partprenantoj.

Antaŭ la seminario, la 1-a somera E-kurso komenciĝis en la 8-a de aŭgusto; pli ol 30 studentoj partoprenis, s-ro Li Baoguo el Ĉinio kaj s-ino Natura el Koreio instruis la bazleciojn, akademiano s-ro Laŭlum instruis historion de la Esperanta literaturo. La kursanoj partoprenis la seminarion ekde la inaŭguro. Interesatoj povos vidi fotojn pri tiuj ĉe

<https://picasaweb.google.com/103383059690917718548>

s-ro Trezoro (Ĉinio), sekretario de ILEI

Komuniko dissendita en la 16a de aŭgusto 2011, unu tagon post la fermo de la aranĝo.

Ricevis ĝin multaj ĉinaj ILEI-membroj kaj aliaj, la sekciestroj kaj komitatanoj de ILEI, la membroj de la eduka retgrupo <e-ins>, la komitatanoj de UEA kaj ilia retgrupo <uea-membroj>. Pluraj pliaj retgrupoj pluperis la informoj, multaj sekciestroj de ILEI sekvis nian peton komuniki ĝin al siaj membroj.

ADIAŬAJ VORTOJ de la E-ASOCIO de TIANJIN

Estimataj estraroj de ILEI-sekcioj de Ĉinio, Japanio kaj Koreio,

Estimataj gastoj,

Karaj gesamideanoj:

En la varma vetero, varma amikeco kaj varma etoso de Esperantujo nia unua ILEI-Seminario en Orienta Azio estas fermita kun fruktoplana rezulto de la entuziasmaj aziaj esperantistoj hodiaŭ.

Dum la mallongaj memorindaj tagoj ni sincere diskutis, aktive interŝanĝis la spertojn, ĝuis diversajn instru-metodojn kaj intime amikiĝis. Krome, ĉiuj seminarianoj propraokule vidis la disvolviĝantan urbon, mem spertis la ĝeneralan vivon de la loĝantoj, iom konis la kulturon, moron kaj folkloron de la lokanoj. Estas menciinde, ke en la kursaro kaj seminario aperas pli da junuloj.

La sama ideo, la samaj aspiroj kaj esperoj ligas nin azianojn unu kun la alia por popularigi Esperanton inter popolanoj, altigi la lingvonivelon, disvastigi la Esperanto-movadon en Azio. Ni esperas, ke azianoj ludos pli kaj pli grandan rolon en la internacia Esperanto-sceno kaj pli kaj pli grandan kontribuon al la Esperanto-movado en la mondo.

Ni ankoraŭfoje dankas vin pro via ĉeesto de la seminario. Viaj ia ajn opinio, ia ajn kritiko estos valoraj kaj bonvenaj por ni, Tianjin-aj esperantistoj, kvankam ni laboras plej pene kiel eble.

Ni volonte lernos de diverslokaj esperantistoj kaj kunlaboros kun vi ĉiuj. Ni estas ĝojaj kaj feliĉaj, se vi kontentas pri nia organizado kaj servado, se vi memoras Tianjin kaj tianjin-ajn esperantistojn. Ni deziras al vi kaj pere de vi al viaj familianoj kaj amikoj bonsanon, feliĉon kaj sukceson. La pordo de Tianjin estos ĉiam malfermita al vi ĉiuj.

Ĝis la revido en la printempa urbo Kunming venontjare!

Dankon al ĉiuj!

Tianjin-a Esperanto-Asocio
2011-8-15



Estraranoj de la ĉina, japana kaj korea sekcioj kun LKK

Kunsido de la tri sekcioj



Partoprenantoj LKK-respondeculoj



HAN Zu-wu



LUAN Hui-qin



GONG Xiao-feng



LIU Bao-guo



HAN Da-qiang



LIU Jun



LEE Jung-kee (el Koreio)



Nema (el Koreio)



Natura (el Koreio)



Ricko (el Japanio)



Belmonto (el Japanio) Ojungeceg (el Mogolio) Tserendejid (el Mongolio) Baldorj (el Mongolio)



Karlo (el Brazilo)

LI Shi-jun

LI Wei-lun

WANG Min-hao



NAN You-li

ZHOU Liu-xi

YE Nian-xian

GAO Chen-yuan



Miaohui

HUANG Yin-bao

ZHANG Chang-sheng

PENG Zheng-ming



LIU Ming-hui



WANG Xiao-tie



WANG Xiao-Hong



SONG Ping



HAO Wei-ning



XU Yun-yin



LI Shu-de



WU Tie-jun



BU Ming-li



LI Yan-qiu



ZHANG Ming-ying



WAN Shu-bing



LIU Jian-guo



instruistino el Pekino



instruistino el Pekino



instruistino el Pekino



instruistino el Pekino



ZHANG Lei



SHI Zong-wen



CHEN Jun-he



CHEN Ye



XIONG Hui



WANG Wen-sheng



ZONG Li



ZHAO Wen-qi



ZHANG Chun-chang



WANG Hui



CHANG Peng-yuan



ZHANG Guo-bin



CHEN Weitong



XIE Jing



ZHANG Di



LIAN Pan



ZHU Rui-zheng



Gestudentoj de la 2-a Somera E-kursaro

Du personoj, kiuj ne povis fizike partopreni en la seminario sed subtenis la semianrion finance kaj morale.



SHI Xue-qin (Negxeta)



CHEN Zai-wei (Hosemo)

DANKEGON al :

Tianjin-a Esperanto-Asocio;

Tianjin Fremdlingva Universitato;

Ĉina Esperanto-Ligo;

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Subtenantoj financaj: korea esperantistino kaj pekina esperantistino, la Korea sekcio, Ricko kaj Belmonto

Voluntuloj;

Ĉiuj partoprenantoj kaj aliĝintoj.

Ĉina sekcio de ILEI
Korea sekcio de ILEI
Japana sekcio de ILEI

2011.8.23

Kompilinto: Arko (20-23 aŭg)

ILEI-prilaboro kun aldono de du pliaj eroj: SMG (24-29 aŭg)

Unua distribuo: 30 aŭg, 2011.

Kreita per Nuanca PDF Create 7